



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
98-a jaro • n-ro 1183 (7-8) • **Julio-aŭgusto 2005**

Esperanto@Interreto: Novaj paŝoj antaŭen



**Projekto
Nesto viglas**

**Kiu flegas
nian lingvon?**

**Esperanto: kiaj
perspektivoj? (2)**



Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@stonline.sk; revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotfino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voclegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 35); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,20.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ☎ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 147 MALFERME: Projekto Nesto Viglas (Adonis Saliba).
148 Esperanto@Interreto: Novaj paŝoj antaŭen (E@I-estraro).
150 Ĉu la Akademio bone flegas nian teknikan lingvon? (Marc Bavant).
151 La 90-a UK jam super 2000 aliĝintoj. Thorsen-apogo por biblioteko. La membrara kresko de UEA plifortiĝas.
152 La centjara jubileo: Berthelot, la fondinto (daŭrigo el la junia revuo; Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux). Kion skribis pri nia revuo en 1933 *Enciklopedio de Esperanto*?
153 Esperanto: Kiaj perspektivoj jarcenton post la unua kongreso? (Daŭrigo el la maja revuo; Claude Piron).
154 KALENDARO 2005-2006.
159 RECENZOJ: Leif Nordenstorm pri *Sed homoj kun homoj*. *Universalaĵ Kongresoj de Esperanto 1905-2005*. José Antonio Vergara pri *Terminologiaj konsideroj*.
160 Jozefo E. Nagy pri *Sensorteco*. La angulo de EVA: Clarence Bicknell: El Aŭtuno.
161 LASTE APERIS.
162 LOKE-FAKE-PERSONE: Albanio (Bardhyl Selimi). Italio. Hispanio (S. Aragaj). Brazilo (Luiz Alberto de Oliveira Coelho). Litovio (Povilas Jegorovas). Lernu.net. Vikipedio (Scott Starkey). Humanistoj. Haszpra. Zvereva/Amis.
163 OFICIALA INFORMILO. Naŭ prelegoj en IKU kaj tri AIS-kursoj en Vilno.
164 TRA LA MONDO: Aktivula trejnadon en Havano (Alberto Fernández-Calienes). Kunveno de la Turo de Princo (Chen Ji).
165 Ni scigu aliajn pri ni! (Rastislav Šarišský). Freŝa vento en Mataró (Ferriol Macip i Bonet).
166 FORPASOJ. Jarlibro 2005 aperis. Invito al Esperanta Fabelkonkurso.

KOVRILPAĜE: La internacia projekto *Esperanto@Interreto*, kies celoj estas ligita al nia lingvo kaj la plej moderna komunikilo, interreto, travivas novan kaj fortan evoluon: ĝi kreas sukcesajn ret-paĝarojn, organizas seminariojn por spertigi junajn esperantistojn, vaste informas la mondon pri la optimuma simbiozo de Esperanto kaj interreto kaj fariĝas memstara, jure sendependa internacia neregistara organizaĵo kun propra statuto (legu pli sur la p. 148-149; 165). Foto: Vladimír Mestner.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39 06 957 57 13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Klappchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: S-ino Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio; ☎ +46 8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans Bakker-Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/☎ +31 (0) 20 642 18 53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Azia Agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎/☎ +86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: D-ro Amri Wandel, N-ro 767, IL-71 908 Makabim, Israelo; ☎ +972 (08) 926 44 62 (h); +972 (02) 658 68 60 (of); ☎ +972 (02) 658 44 61; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Landa kaj Regiona Agado: S-ino Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎ +53 (7) 539201 (h); 404484 (of); ☎ 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ino Sonja Petrović.

Observanto de ILEI: S-ro Radjica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka Pietiläinen, Auringonkatu 8 E 48, FI-02210 Espoo, Finnlando; ☎ +358 (9) 8036149 (h); ☎/☎ (3) 215 7026 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Projekto Nesto viglas

Adonis Saliba



La 1-an de majo la projekto Nesto festis sian duan naskiĝtagon. Ĝi ŝajnas esti simpla interreta servo por longdistanca instruado de Esperanto, tamen ĝi estas ja revolucia instrusistemo por la Esperanto-movado. Ĝi ne nur celas instrui la lingvon, sed ankaŭ prepari esperantistojn por la loka kaj regiona movado. Ekzistas en la reto tre belaspektaj kaj instruaj retlokoj, kie oni trovas kursojn de Esperanto. Aldone al ili, Nesto pretas virtuale parigi homojn al homoj. Temas pri lernantoj kaj instruistoj, kiuj parolas la saman nacian lingvon kaj preferinde vivas proksime.

Nia movado, post la alveno de interreto, krizis pro grava homa perdo en siaj malofte vizitataj asocioj, pro diversaj kaŭzoj, kiuj varias de maljuniĝo de la membroj ĝis ekstermodaj instrusistemoj. Tamen jam de dek jaroj ni, esperantistoj, svamas en la reto. Kelkaj diras ke ni, interretanoj, ribelas kontraŭ niaj tradiciaj organoj, ĉar ili estas mucide stagnaj kaj hobiaj. Tio povas esti la kazo, ĉar la mondaĵ paradigmoj ŝanĝiĝis, tial ni bezonas renoviĝojn kaj revigliĝojn.

Nesto, kiu estas sukcesa entrepreno por longdistanca instruado de Esperanto, helpas la migradon de nia simpla lingvoprotekta strukturo, kiu ekzistas en la tradiciaj kluboj, al socia interagado, kiu permesas lernadon kaj praktikadon de la lingvo en virtuala mondo. Sociscience tio estas grava kontribuo al diversnacia intelekta kunvivado kaj Esperanto estas ilo por tio. La tradicia Esperanto-Movado devos rekonii la ekeston de alia kulturo kun tute diversa interrilatiga etiketo. Nur tiel oni postvivos. Interreto estas absolute neformala. Ĝi permesas ampleksekan elektokapablon kun bunta opcio, inter ili, Esperanto. Kaj ni nur povas atingi opciaĵojn favore al Esperanto per konvinkaj ideoj pri la lingvo kaj ties neceso por la mondo. La antaŭaj naciaj kontaktoj fariĝas nun translimaj.

Niaj antaŭaj sporadaj kontaktoj en kongresoj kaj monataj klubaj eventoj ne plu estas necesaj por praktiki nian lingvon. Fakte oni faras tion multe pli forte kaj firme nuntempe. Legi, skribi, paroli kaj interrilati estas simpla interretumada ago kaj Esperanto fariĝas kreskanta ilo por tio.


Dum du jaroj Nesto havis pli ol 3700 interesitojn, kun mezuma aĝo de 33 jaroj. Ĝi atingis pli ol 150 instruistojn en pli ol 30 landoj. La fama baznivela metodo KaPe, kreita de Carlos Pereira, estas adoptita de la skipo. Por meznivela kurso ni adoptis la faman metodon de Claude Piron *Gerda Malaperis*. Kuntekste de tuja interreta kontakto, ni adoptas la diskutlistojn por administrati kaj ĉiutage

kongresumi inter ni, instruistoj kaj "nestidoj". Tiuj komunumoj en jahuj* listoj arigas nun ĉirkaŭ mil homojn en pli ol 5 nacilingvaj virtualaj komunumoj (angla, hispana, portugala, pola kaj administra listo). Brazilo, ekde la komenco, pintas en la statistikoj de Nesto, kiu estas forte sekvata de Hispanio, Usono kaj Meksiko. Viglaj komunumoj de Nesto estas en Pollando, Portugalio kaj Argentino. Nesto celas ne nur Eŭropon. Ĝi celas la mondon kaj celas produkti

esperantistojn, kie ili maldensas. Ĝi emas semi la ideojn de la Manifesto de Prago en Afriko kaj en la diversaj landoj de Sud- kaj Centrameriko, en Azio kaj en Oceanio, kie ĝi stipendias la kursojn kaj jam havas naciajn reprezentantojn en dek landoj, kiuj helpas kunordigi kaj evoluigi la landajn lernantojn. Pedagogie, ĝi havas la subtenon de Grupo de Kibernetika Pedagogio de Universitato de San-Paŭlo kaj per la internacia ekzameno jam diplomis ĉirkaŭ 180 lernantojn.

Nesto (<http://www.monda.org/nesto>) volas instrui ne nur la lingvon, sed ankaŭ la idearon de Esperanto. Kiel saŭcon al tiu mirinda salato, ĝi aldonis Radion Nesto (<http://www.monda.org/radionesto>), kiu funkcias en interreto kun 24-hora servo, por prezenti la parolantan kaj kantantan Esperanton. Ĉio estas kunordigata el la centra sekretariejo en San-Paŭlo (Brazilo), kiu havas pagitan sekretarion Marsjo kaj volontulon Adonis (administra listo kaj Radio), sub potenca komputilo reganta pezan bankdatumaron.

Kelkfoje la homoj pensas ke ni marŝas reen kiam ni volas batali kun kelkaj simbolaj motivoj de esperantismo, kiam ni montras "fratecon" kiel flagon. Ni aldonis tion al la fama dekjara programo de Unesko "Kulturo por la paco" kun la spicoj de la Praga Manifesto kaj celas disvolvi la programon kadre de la NRO-aj celoj. Pro tio ni ĉeestas en la retpaĝoj de Unesko sub UEA-ŝildo. La projekto bezonas interretajn homojn: baznivelaĵoj kaj meznivelaĵoj instruistojn de Esperanto. Ĝi havas donacantan konton ĉe UEA: "nest-o". Dankon al la donacintoj, ĝi ja bezonas monon por pagi sian strukturon kaj diskonigi la ideojn tra la reto, kiel ĝi ekzemple faras per guglo**. Krom tio bezonatas ke oni diskonigu la projekton Nesto en pluaj landoj kaj komunumoj. La projekto volas esti produktejo de esperantistoj, kiuj renovigos niajn ne tiel firmajn asociojn kaj kiuj povos interkomunikiĝi tra la mondo kaj daŭre montri la viklecon de nia jarcenta movado. Ni certas ke inter niaj inteligentaj kaj interretemaj nestidoj estos kelkaj respondoj por niaj nunaj demandoj pri la estonteco de Esperanto. Ni semas kaj semas konstante.



Marsjo



Adonis

Esperanto@Interreto: novaj paŝoj antaŭen

Certe multaj el vi jam konas la internacian grupon Esperanto@Interreto (mallonge: E@I). Nun venis ĝia plua evolu-paŝo, pri kiu ni ŝatus iom diri al vi – ĉu kiel uzi(a/o)ntoj de ĝiaj projektoj, retpaĝoj, ĉu ĝiaj kunlabori(a/o)ntoj aŭ subvencidoni(a/o)ntoj. Ni nun strebos skizi ĝian ĝisnunan vojon.

deoj malantaŭ Esperanto@Interreto: ● Esperanto estas komunikilo interhoma, sendependa de nacieco kaj gepatra lingvo. ● Ne gravas el kiu lando vi estas, la eblo komuniki samas! ● Interreto estas komunikilo interhoma, sendependa de geografia distanco. ● Ambaŭ kune eĉ pli bone:



perfekta paro por tutmonde komuniki facile kaj rapide!

Historio: "Gepatroj" de E@I estas tri junaj homoj (Hokan, Nastja kaj Dovile), kiuj en la jaro 1999 naskis la ideon pri organizaĵo, kiu kunmetu en sian celaron ambaŭ komunikilojn – la neŭtralajn lingvon kaj teknikojn. Ekde la jaro 2000 okazadas regule seminarioj: Rete Kunlabori, Rete Lingvumi, Rete Informadi... kun la celo spertigi junajn esperantistojn pri aferoj rilataj al Esperanto kaj interreto. La lasta okazis ĉi-junie en Slovakio kaj tuŝis la aspektigadon de afiŝoj, flugfolioj kaj kreadon de ret-paĝoj. (Rezultoj de la trejn-seminario, afiŝoj, informiloj: <http://ikso.net/cgi-bin/wiki.pl>). Ekde la jaro 2001 oni prizorgas retpaĝarajn projektojn. Ekde la somero 2003 Esperanto@Interreto estas faka sekcio de TEJO.

Nuntempo: Esperanto@Interreto (E@I) estas laborgrupo rilate al TEJO. Ĝi realigas projektojn kiuj helpas al Esperanto-parolantoj uzi interreton por tutmonde kunlabori, informi pri Esperanto kaj instrui ĝin. La tri ĉefaj agadkampoj de E@I estas krei ret-paĝarojn, organizi seminariojn kaj informi pri kiel Esperanto kaj interreto kune uzeblas por tutmonde komuniki facile kaj rapide!

Estonto: Espereble jam en tiu ĉi momento, kiam vi legas ĉi tiujn liniojn, E@I ekzistas kiel memstara, internacia, neregistara organizaĵo, jure sendependa, kun propra statuto (registrita kiel „civitana societo“ en Slovakio). Antaŭvideblas pluaj sukcesaj projektoj, vasta komunumo de anoj, kunlabora(o)ntoj.



Ĉeestintoj de la seminario en Sarajevo, 2004

Celoj de E@I: (laŭ la „freŝa“ statuto): ● Instigi interkulturan lernadon kaj internacian kunlaboron kaj komunikadon. ● Subteni lernadon kaj uzadon de interret-teknikoj kaj lingvoj. ● Helpi la validigadon de la Carto de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝia Deklaracio de homaj rajtoj.

Vojoj: ● Iniciati kaj subteni projektojn pri internacia kunlaboro de junuloj. ● Organizi klerigajn kaj kulturajn aranĝojn, rilatajn al la celoj. ● Informi pri la graveco kaj utileco de internacia senbara komunikado.

La plejaj projektoj de E@I: Ĝis nun E@I povas fieri pri kelkaj projektoj, kiuj vere meritas atenton:

La Lingva prismo (www.lingvo.info): Paĝaro pri lingva diverseco kiu prezentas aron da lingvoj kaj alfabetoj de la mondo kaj instigas al ekscio pri lingvaj faktoj per enreta kvizo. Krom la distra parto, la paĝaro prezentas la principojn kaj strategiojn de interlingvismo kaj de translingvaj komunik-strategioj. Ĝis nun la paĝaro ekzistas en 9 lingvaj versioj.

lernu! (www.lernu.net): multlingva kursejo de Esperanto kiu celas Esperanto-lernemulojn. Krom kursoj en diversaj niveloj, ĝi enhavas vortarojn, superrigardon de la gramatiko, laŭtlegitajn rakontojn kun bildoj, prezentojn de Esperanto, tujmesaĝilon, filmetojn, virtualajn lecionojn ktp. Ĝi disponeblas en 24 lingvoj.

Interkulturo (www.interkulturo.net): Tiu ĉi paĝaro celas subteni grupojn kiuj partoprenas en la projekto Interkulturo. La ideo de Interkulturo estas ke grupoj de diversaj landoj duope interŝanĝu sciojn kaj spertojn pri kulturaj temoj. La paĝaro enhavas buntan materialon, ebligas kontakti fremdlandajn grupojn, unuopulojn, celante pliriĝi siajn konojn kaj sciojn pri aliaj (kulturoj, kutimoj, vidpunktoj...). La sinsekvo ne estas hazarda, ĝi estas t.n. Triopa efiko interkultura (laŭ Radojica Petroviĉ): ● Informado kaj edukado pri lingva diverseco (Lingva prismo). ● Lingvolernado kaj edukado al lingva diverseco („Lernu!“). ● Edukado al kultura diverseco per aplikata lingvolernado (Interkulturo). Tiu ĉi projekt-triopo per sia kontribuo al la kampo de interkultura komunikado vekis intereson de Federacio Internacia de Profesoroj de Lingvoj Vivantaj (FIPLV, www.fipltv.org), kiu dum sia konferenco Linguapax, majo 2004 en Barcelona, atribuis al ĝi premion kaj rekomendis ĝin al Unesko kiel modelan subtenindan projekton!



Edukado (www.edukado.net): Paĝaro kun la celo helpi al Esperanto-instruistoj, enhavas kolekton de lerniloj, 320 ekzercojn, librokatalogon kun opinioj de homoj kiuj uzis la librojn (220 libroj kun plena analizo), liston de aktualaj kursoj ktp. (Ĉi-somere la paĝaro estos renovigita, kun novaj servoj.)



www.tejo.org: La paĝaro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo pro sia multlingveco ricevis en la jaro 2003 Premion pri multlingva lernado de la sveda organizaĵo Tema Modersmål.



Reta Informado-Centro (www.ikso.net/RIC): Paĝaro kiu subtenas Esperanto-informantojn. Per RIC eblas: ● Elŭti informilojn en diversaj lingvoj kaj formatoj. ● Preni informilerojn utilajn kiam oni volas krei sian propran informilon. ● Legi kaj diskuti konsilojn pri informado. ● Preni „faktojn“ por sia prelego aŭ simile. ● Alŭti informilojn por ke ankaŭ aliaj povu uzi ilin.



Artista datenbazo (<http://artista.ikso.net/>): La artista datenbazo celas plifaciligi la organizadon de koncertoj kaj aliaj artaj aranĝoj en kaj ankaŭ ekster Esperantujo. Kerne estas datenbazo kun informoj pri artistoj (kaj prelegantoj, eble longperspektive ankaŭ ĝenerala datenbazo pri homfortoj en Esperantujo). Aldone estos aro da iloj por organizado kiel: ● Modelaj kontraktoj. ● Modelaj buĝetoj. ● Kiel organizi koncerton kaj oftaj problemoj en organizado de koncertoj? ● Kiuj subvencioj ekzistas kaj kie peti ilin? ● Diversaj utilaj dokumentoj kaj ligoj.



Flugiloj de malfacila vento (www.ikso.net/flugiloj) estas projekto por plivastigi kaj subteni la instruadon de Esperanto inter junuloj. Ekzistas pluraj aferoj kiuj malfaciligas la instruadon de Esperanto al kaj fare de gejunuloj, ekzemple: ● Malalta lingvonivelo ĉe multaj junuloj. ● Ekzistas malmulte da junaj E-instruantoj. ● Malabundus materialo taŭga por junuloj. ● Molestas ebloj peti monon de eksteraj fondaĵoj por Esperanto-instruado. ● Malfacilas trovi interesigaĵojn kaj / aŭ instigi komencintojn daŭrigi la lernadon. La projekto estas farata kunlabore kun ILEI – kaj krom teoriaj konsiloj, ekz. freŝeldonitaj en Manlibro pri instruado de Esperanto – ĝi konsistas ankaŭ el trejn-seminarioj por gejunuloj (la sekva okazos dum la IJK en Zakopane), tuŝantaj la temon instruado de Esperanto.

Kelkaj estontaj projektoj de E@I:

Profesinivela DVD „Elektronika Esperantio“ – la celo estas disponigi al vasta publiko (kaj e-ista kaj „ekster-movada“) Esperanton en kiel eble plej bunta materialaro, de bazaj informoj (reguloj, fotaro, vortaroj, kursoj, muziko, filmoj...) kaj prezenti ĝin kiel vivantan komunikilon, kun propraj kulturo, historio, personecoj... La disko havu liberan kopirajton kaj servu kaj kiel inform-fonto kaj kiel reklamilo.

La paĝaro www.esperanto.info – estu la baza „ŝtono“ por homoj, kiuj volas rete ekscii ion pri Esperanto. Ĝi estu multlingva, konciza, kun bazaj sed trafaj informoj pri Esperanto.

Reta butiklo – reta vendejo de esperantaĵoj, celanta ankaŭ neesperantistajn publikon (komencantojn, subtenantojn...). Multlingva, moderna vendejo de libroj, lernolibroj, T-ĉemizoj, surgluaĵoj, kartetoj, insignoj...

Elektronika fotaro – servu kiel publika stokejo kun fotoj de E-aranĝoj, serĉeblaj laŭ pluraj kriterioj (lando, dato, okazaĵo...).



Komputilejoj jam apartenas al la nepraj partoj de E@I-seminarioj.

Trejn-seminarioj: Unu el la kernaj kampoj de E@I-agado restas seminarioj. En tiuj seminarioj ĵamaj Esperanto-aktivuloj trejniĝas kaj spertigas pri diversaj manieroj uzi Esperanton kaj interreton, aperas novaj aktivuloj, kaj eĉ novaj Esperanto-parolantoj. Dum la seminarioj teamoj de aktualaj E@I-projektoj renkontiĝas kaj ofte freŝiĝas per novaj membroj, naskiĝas ideoj por novaj projektoj kaj aktivigas novaj homoj.

La nuna estraro de E@I: Petro Baláz: prezidanto, prezentado dum aranĝoj, kunordigado ktp. Hokan Lundberg: ĝen. sekretario, komunikado, ev. subteno al aliaj. Nastja Kojevnikova: financoj, seminarioj. Chuck Smith: amerika agado kaj eksteraj rilatoj. Slavik Ivanov: informado kaj komitatano de TEJO.

Konsilantoj: Ralf Frölich: strategio kaj subvencipetado. Sonja Petroviĉ: subvencipetado. Bertilo Wennergren: lingvaj aferoj.

Membreco: Nuntempe la ĉefa strukturo de E@I estas retpoŝta diskutlisto: ecxei-membroj@yahooogroups.com, al kiu interesiĝantoj/kunlaboremuloj povas aliĝi per sendo de ajnenhava (aŭ malplena) mesaĝo al: ecxei-membroj-subscribe@yahooogroups.com.

Fondaĵo: Se vi opinias nian laboron valora kaj utila kaj volus subteni ĝin estonte, viaj financaj donacoj estas bonvenaj ĉe la UEA-konto ecxi-v. La rimedoj de la fondaĵo estas uzataj por finance subteni: ● E@I-seminariojn, kiam rimedoj de aliaj fondaĵoj/subtenantoj ne sufiĉas. ● Unuopulojn kiuj bezonas subtenon por partopreni en eventoj utilaj por la E@I-agado. ● Ĝenerala administrado de la E@I-agado (retpaĝoj, kopiado, sendo-kostoj ktp).

Kunlaboro: E@I bonvenigas homojn, pretajn helpi kaj kunlabori ĉe ajna projekto (kongruanta kun ĝiaj celoj). Se vi pretas helpi – okupiĝi pri iu projekto (aŭ volas proponi tute novan), scipovas programi, tradukadi, aspektigadi – vi havos la pordon malfermita.

E@I estraro
www.ikso.net, estraro@ikso.net

PS: La estonteco al kiu Lingvo Internacia iam estis donaco, komencis alveni. La iama estonteco estas nia nuna tempo. Ni ĝuuj ĝin kune, malfarmante la okulojn al la ebloj kaj ivoj de Esperanto kaj interreto!



Ĉeestintoj de la junia trejnseminario en Slovakio

Ĉu la Akademio bone flegas nian teknikan lingvon?

La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de nia lingvo kaj kontroli ĝian evoluon. Marc Bavant, mineja inĝeniero, fakulo pri komunik-retoj kaj direktoro de la Sekcio pri faka lingvo (antaŭe Sekcio pri teknika vortaro) de la Akademio de Esperanto, parolas pri sia laboro.



Marc Bavant

❖ Vi estis elektita unuafoje al la Akademio de Esperanto en 2004. Kiel aspektas tiu institucio por novulo?

Nu, ĝuste, estante novulo mi ne povas multon diri pri ĝi. Multaj akademianoj estas famuloj, jam tre aktivaj en la profesio aŭ en la Movado, kaj facilas kompreni, ke ili aktivigas por la Akademio ĉefe en gravaj cirkonstancoj. Mi do surpriziĝis vidante, ke ni havis viglegan kaj bonkvalitan laboron ene de la Sekcio pri ĝenerala vortaro pere de reta diskutrodo. Ja ĉi tiu Sekcio estas preparanta grandskalan Oficialan Aldonon, t.e. la oficialigon de novaj radikoj kaj de ilia signifo, kaj estas bone, ke tiom grava evento vekas ĉies atenton.

❖ Sed vi partoprenas ankaŭ en la laboroj de aliaj Sekcioj, ĉu? Jes, multaj akademianoj apartenas samtempe al pluraj Sekcioj, sed pro la limigita laborforto ne ĉiuj Sekcioj povas aktive labori samtempe. Mi do atendis aprilon por lanĉi la Sekcion pri faka lingvo, kiun mi estras de la komenco de 2005. Estas defio veki ĉi tiun Sekcion, kiu dormas de pluraj jaroj, sed mi havas ideojn.

❖ Kiujn ekzemploj?

Unue necesis redefini la agadkampon de la Sekcio. Antaŭe ĝi nomiĝis Sekcio pri teknikaj vortaroj kaj ni decidis ŝanĝi ĉi tion al Sekcio pri faka lingvo. Tio estas ne nur simbola, sed montras, ke ni celas tre vastan diapazonon: ne nur "teknikon", kion ajn tio signifas, ne nur sciencojn ("purajn", naturajn, homajn...), sed ĉian fakon kun ĝia propra vortprovizo kaj, pli ĝenerale, propra faklingvo.

❖ Ĉu ne estas tro ambicie vastigi la diapazonon, se mankas laborforto?

Jes, estas ambicie, sed aliflanke per tio ni pli larĝe malfermas la pordon kaj ebligas, ke pli da homoj kun serioza terminologia projekto vidu eblecon turni sin al ni. Ĉiokaze ni bezonas malfirmi la pordon al eksteruloj. La Akademio nek povas, nek devas ĉion fari mem. Nuntempe en la Sekcio oficiale registriĝis naŭ Akademianoj kaj ni invitis kvin fakulojn, t.n. ekster-Akademianojn fakajn kunlaborantojn, partopreni niajn diskutojn en reta diskutrodo. Ni kompreneble invitos pliajn laŭ la bezonoj kaj la pritraktotaj temoj.

❖ Ĉu la Sekcio eldonos terminarojn, fakajn vortarojn...?

Tio povus esti celo, sed por do tiu funkcio, necesus arigi multajn kompetentulojn kaj gvidi ilian laboron. Tio estas malfacile realigebla por la strukturoj de nia tipo. Pli realisma

scenaro estus, ke iu individuo, ne nepre akademiano, sed kun la necesaj kompetentoj kaj laborpreteco, organizu mem la laboron de sia grupeto kaj kontaktu la Sekcion konsulte, por ke ĉi-lasto donu al li konsilojn, kontrolu la progreson de la laboro, kaj povu proponi al la Akademio, ke ĝi aprobu la koncernan verkon.

❖ Ĉu tiaj homoj ekzistas?

Certe! Mi troviĝis en iom simila situacio, kiam mi verkis mian *Matematikan vortaron*, aperintan ĉe Kava-Pech en 2003. Mi faris grandan parton de la laboro sola, krom dum la kontrolo etapo, kaj ioma subteno povus esti grava instigo. Cetere ekzistas homoj pretaj labori en diversaj flankaj branĉoj de la terminologia laboro: ekzistas fakaj asocioj, ekzistas la Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC), ekzistas la projekto Reta Vortaro (REVO), ekzistas la Reta Scienca kaj Teknika E-Biblioteko (STEB)...

❖ Kiuj estos la rilatoj inter la supre menciita TEC kaj via Sekcio?

Nu, vi eble scias, ke la antaŭa respondeculo de TEC kreis ambician TTT-paĝaron, kiu bedaŭrinde restis apenaŭ uzata. Do ĉi tiu paĝaro fermiĝis kaj anstataŭe estis kreita pli modesta paĝaro, por vivteni la Centron ĝis pli favoraj tempoj. La Sekcio principe subtenas la klopodojn revivigi TEC-on kaj igi, ke ĝi estu fonto de informo pri la internaciaj normoj de terminologia laboro. Jam ekzistas tiutema literaturo sur la bretoj de niaj libroservoj, sed indas diskonigi la enhavon de diversaj ISO-normoj kaj Dirk Bindmann, la nova TTT-estro de TEC, komencis la taskon.

❖ El la supre dirita ŝajnas, ke vi celas, ke la Akademio donu al si rimedojn por kapabli almeti la stampon "Aprobata de la Akademio"?

Jes. Tio estas aparte grava en la kampo de faka vortprovizo, ĉar tie regas granda haoso kaj estas konate, ke la kampo de nomendaj nocioj vastiĝas en ĉiu sekundo. Estus tre bone, se la Akademio povus ludi stabiligan rolon en la afero. Tial do ni difinis kiel prioritatan taskon difini aron da kriterioj respektotaj de la aŭtoroj de terminaro aŭ faka vortaro.

❖ Ĉu tamen la aŭtoritataj vortaroj kiel PIV ne ludas tiun stabiligan rolon?

Jes, ili ĝin ludas laŭ siaj rimedoj. Unue ne ĉiuj fakoj ricevas en ĝenerala vortaro samkvalitan pritrakton, kaj due la elekto de aperontaj vortoj estas tikla afero: ekzemple, iuj fakaj vortoj

aperas en la vortaro, ĉar oni aŭdas ilin ankaŭ en nacilingvaj amaskomunikiloj kaj aspektus malmoderne ilin malhavi. Sed ili ne povas ricevi taŭgan difinon en tiu kadro. Cetere, se ni sekvas la evoluojn ekde *Plena Vortaro* ĝis la lasta *Plena Ilustrita Vortaro*, necesas rimarkigi, ke multaj terminoj ŝanĝiĝis eĉ por la plej senŝanĝaj nocioj. Kaj tio estas tre malnova emo de la esperantistaro. Antaŭ nelonge mi havis la ŝancon konsulti en Biblioteko Hodler de la Centra Oficejo sciencan terminaron el la jaro 1931. Malgraŭ tio ke ĝin redaktis tiama famulo Rollet de l'Isle, estas interese konстати, ke en la tiu poste aperinta *Plena Vortaro* multaj el tiuj proponitaj terminoj ne troviĝas aŭ troviĝas sub alia formo.

❖ Foje aŭdiĝas plendoj, ke la faka lingvo estas tro malproksima de la popolo, kaj ke malmultaj ĝin komprenas. Ĉu eblas fari, ke pacientoj komprenu, je kiu malsano ili suferas?

La demando ne tuŝas nur Esperanton. Efektive, en iuj lingvoj ekzistas paralelaj terminprovizoj por la plej ofte renkontataj nocioj en medicino, anatomio ktp: oni ekzemple povas diri *rekta intesto* anstataŭ *rektumo*, *ŝlosil-osto* anstataŭ *klavikulo* k.s. Ni certe povus lasi nin inspiri per tiuj lingvoj por eviti enkondukon de novaj radikoj el la latin-greka vortprovizo, sed tio ne estas universala solvo, kaj proksimigas la fakan lingvon al la popolo nur ŝajne: ja kvankam la termino estas malpli timiga, ni tamen bezonas lerni, kio estas *ŝlosilosto*, ĉu ne? Iom da scienca edukado ĉiam estos bezonata. Estas vero, ke la Esperanta scienca terminologio distingiĝas per troa deziro apartiĝi de la komunuzaj vortoj. Por preni ekzemplon matematikan, de ĉiuj leĵantoj estas bone konataj la nombroj *entjeraj*, *racionalaj*, *realaj* kaj *kompleksaj*: kvar adjektivoj kun pure faka senco, dum por poloj tiuj nombroj estas respektive *tutecaj*, *mezureblaj*, *realaj* kaj *kunmetitaj*...

❖ Kiel vi pensas, ke oni povas teni Esperanton simpla kaj fleksebla antaŭ sciencistoj, kiuj opinias ke la plej bona solvo

estas preni internaciajn vortojn en la formo, en kiu ili ekzistas en eŭropaj lingvoj?

Evidente devas esti ĉies zorgo teni la komunan lingvon simpla, eviti uzon de neoficialaj vortoj kaj preferi kunmetaĵojn al perpleksigaj pruntoj. Aliflanke la scienca lingvo havas multajn internaciajn vortojn kaj la 15-a Regulo rajtas aplikigi, el kio aŭtomate rezultas plia eŭropeco de la lingvo. Tio estas bedaŭrinda, sed mi ne certas, se ni prenas araban aŭ korean formon anstataŭ la latindevena *klavikulo*, ĉu tio helpus teni la lingvon pli simpla por la plimulto. Ĉiokaze la problemoj ne estas facile forgesseblaj: multaj el la sciencaj radikoj, kiujn ni prunteprenas el la latin-greka vortrezoro, havas internan

strukturon, kiun Esperanto ne povas analizi. Eĉ mezkleraj homoj scias, ke *hemoragio*, *hematomo* kaj multaj aliaj ne hazarde komenciĝas per *hemat-*. Ĉar temas pri greka elemento signifanta sangon. Foje oni povus laŭvorte traduki la latin-grekan kunmetaĵon (ekz-e *sangelfluo*, *sangamasigo*), sed tio malofte funkcias. La internaciaj terminologiaj instancoj ne hezitas uzi vortfarajn rimedojn similajn al tiuj de Esperanto por produkti la tute artefaritajn nomenklaturejojn de hemiaj komponaĵoj, malsanoj k.a. En Esperanto ni delonge parolas pri la t.n. sciencaj afiksoj (ekz-e la sufikso *-it* montranta inflamon, kiel

en *ezofagito*), sed nek volas, nek povas doni oficialan statuson al tiuj ĉi elementoj, kiuj ne kondukas kiel la bazaj afiksoj: ili ne estas uzeblaj memstare (oni ne diras *ito* por signifi inflamon), kaj alĝuiĝas nur al kelkaj radikoj, difinitaj de la etimologia kaprico (ekz-e *otito*, *dermito*, ne *orelito* aŭ *haŭtitito*). Ŝajnas, ke tio estas grava kampo de teoria pripensado.

❖ Kio alia kuŝas sur la tablo?

La Sekcio ĵus aprobis sian unuan laborplanon. Krom la supre skizitaj taskoj ni intencas ankaŭ interesiĝi pri la historio de la Sekcio kaj pri la terminologiaj dokumentoj de la pasinteco. Ne eblas konstrui ion sen atenta konsidero de la laboroj de niaj antaŭuloj.

LA 90-a UK jam super 2000 aliĝintoj

Ĝis la 1-a de junio entute 2040 kongresanoj el 60 landoj aliĝis al la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (23-30 julio 2005).

Sekve jam du monatojn antaŭ sia komenco la Vilna UK superis la pasintjaran UK en Pekino, al kiu aliĝis 2031 kongresanoj el 51 landoj kaj kiu estis la plej granda UK post la jaro 1999, kiam la UK en Berlino arigis 2712 aliĝintojn.

Kun 357 aliĝintoj Litovio estas ĉe la pinto de la statistiko. Sekvas Francio (225), Japanio (165) kaj Germanio (154). Multnombro reprezentataj en Vilno estos ankaŭ Pollando (95), Rusio (91), Italio (78), Nederlando (73), Finnlando (68), Svedio (62), Belgio (59), Ĉeĥio (45), Britio (44) kaj Danio (40). Apud Japanio, plej multe da ekster-eŭropaj aliĝintoj ĝis nun liveris Usono (38), Korea Respubliko (32), Irano (24), Aŭstralio kaj Brazilo (po 21).

La membrara kresko de UEA plifortiĝas

La kresko de la individua membraro de UEA plifortiĝis en la unuaj monatoj de la nuna jaro. Ĝis la 31-a de majo ĉe UEA estis registritaj 5424 individuaj membroj, kio estas je 312 pli multe ol en la sama dato pasintjare.

En 2004 la tutjara kresko estis 142. Parte la pli forta kresko en la maja statistiko verŝajne rezultas el pli efika administrado de kotizoj en la Centra Oficejo, sed ĉefe temas pri efektiva kresko. La Centra Oficejo antaŭvidas, ke ĉi-jare la fina nombro de individuaj membroj denove superos 6000, unuafoje post la jaro 2001.

Thorsen-apogo por bibliotekoj



Esperanto-bibliotekoj povas denove peti librojn, kiuj mankas en iliaj kolektoj, ĉar jam la naŭan fojon UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.

Por subvencio rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La petojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, sonkasedoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. La subvencioj oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton.

La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA plej laste la 15-an de oktobro 2005. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin ankaŭ rete al <direktoro@co.uea.org>.

Berthelot, la fondinto

La 18-an de junio 1905 aperis la unua numero de nia revuo. Okaze de la 70-jara datreveno, en junio 1975, omaĝe al la fondinto de la revuo Paul Berthelot (1881-1910), nia revuo aperigis la sekvan artikolon. (Daŭrigo/finio el la junia revuo.)

La nova periodaĵo estis primovada kaj bone akceptita; ĝi estis ne nur abonebla sed ankaŭ "aĉetebla en ĉiuj francaj kaj svisaj stacidomoj". Jen letero de d-ro Zamenhof, presita en la dua numero de la nova gazeto:

"Kara sinjoro, Mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto 'Esperanto' kaj mi dankas Vin kore. Mi legis la numeron kun plezuro kaj granda intereso. Mi deziras al Via entrepreno la plej bonan sukceson. Via, L. Zamenhof."

En la sama – dua – numero de la gazeto, Berthelot ekpublikigis sian "Vortareto Esperanto-Esperanta", la unuan provon de vortaro tute en Esperanto.

Transloĝiĝinte al Genevo, Berthelot pene daŭrigis la eldonadon de la gazeto. Ĝi tiam estis presata en Ballegarde (Ain, Francio), sed, pro financoj, administraj malhelpoj kaj bojkotado, Berthelot cedis sian gazeton al Hector Hodler. La 12-an de februaro 1907 reaperis *Esperanto*, kies nova direktoro estis Hodler. Por la unua fojo, krom kvarlingva ĉefartikolo, ĝi havis tekston tute en Esperanto – signo nekontestebla de ĝia jama universaleco.

Je la fondiĝo de UEA, en 1908, *Esperanto* fariĝis ĝia oficiala organo.

Suldaĵi ni estas al Paul Berthelot. Li meritis, ke ni pli bone konu liajn ĝis nun nedankitajn servojn por Esperanto.

Kromaj verkoj de Paul Berthelot:

Vocabulaire Français-espéranto (kun Cart kaj Merckens), Paris 1903; kvarfoje reeldonita.

Komercaj leteroj (kun Lambert), Paris 1903; dufoje reeldonita.

Fonetiko litera (pseŭdonimo Marcelo Verema), Céret 1904; reeldonita.

Provo de kĥemia nomigado, Céret 1904.

L'évangile de l'heure (La Evangelio de la horo). Anarkiista sloganaro. En 1912, do post la morto de Berthelot, tradukita en Esperanton de D. Ivanski kaj eldonita broŝurforme de *Internacia Socia Revuo*. El Esperanto tradukita japanen kaj ĉinen. Plurfoje reeldonita de japanaj anarkiistoj kaj felietone ankaŭ en *La Voĉo de la Popolo*, ĉina Esperanto-periodaĵo, ekaperinta en 1913.

Tradukaĵo: *Fantasio*, komedio en du aktoj de Musset. Post la morto de Berthelot omaĝe publikigita de Bourlet, unue en *La Revuo* kaj poste libroforme.

Por *Esperanto* kunlabore verkis Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux



Paul Berthelot
(1881-1910)

Kion skribis pri nia revuo en 1933 Enciklopedio de Esperanto?

Esperanto. Ĉefa gazeto de la E-movado, oficiala organo (monata) de UEA. Fondis la gazeton la franca esperantisto Paul Berthelot en junio 1905. Post dujara baraktado li transdonis ĝin en 1907 al H. Hodler, kiu estis posedanto kaj redaktoro ĝis 1920.

Tiam kaj ĝis 1910 ĝi aperis en 48x34 cm-a formato, en 1909 eĉ 60 cm alta kaj 44 cm larĝa, la "littuka" periodo; paĝonombro: 4-6. Ekde 1911 la formato fariĝis 32x23. Ĝis 1914 la gazeto aperis dufoje monate kun preskaŭ matematika reguleco. La enhavo estis lerta miksaĵo de tagaj kaj esperantistaj okazintaĵoj. Jam en la unuaj numeroj montriĝas la talento de Hodler, turni la atenton al praktikaj aferoj. Li tendence atentis sociajn problemojn kaj ĉiam revenis je la ĉefa ideo: harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de Esperanto. En 1908 fondiĝis UEA, konkreta solvo de tiu ĉi ideo. La evoluon trancis la milito.

Post kelkmonata interrompo tamen reaperis la revuo en 1915. En artikoloj ankoraŭ nun legindaj la redaktoro montris la kaŭzojn de la tutmonda katastrofo, laŭgrade evoluigante la ĉefajn ideojn pri la intergenta malordo. Hodler mortis en apr. 1920, la revuon heredis UEA kune kun sumo por kovri eblan deficiton. Nova redaktoro fariĝis

E. Privat, kiu fidele sekvis la tradicion de la revuo kaj klopodis igi ĝin tribuno de plej noblaj ideoj. Periodaĵo, kiu servas por movado kun nepolitika karaktero, por movado lingva, internacia, kaj kies legantaro grupiĝas el ĉiuj klasoj sociaj, havas certan malfacilecon. Aŭ ĝi fariĝas senkolora, oficiala komunikilo plej teda, aŭ ĝi estos amuza kafotabla legaĵo kun rakontetoj infanecaj. Multaj temoj estas neeblaj por ĝi, aliaj postulas atenton, dekstre kaj maldekstre, dume restas ankoraŭ la plia malhelpo, ke la legantaro ne estas unuforma. Nombro de la presitaj ekzempleroj: en 1913: 66 000, en 1920: 35 000, en 1925: 96 000, en 1930: 75 000, en 1932: 72 000. Paĝonombro en 1913: 382, en 1920: 244, en 1925: 234, en 1930: 210, en 1932: 200. La teknikan arangon kaj parte la redaktan laboron prizorgas la direktoro de UEA, H. Jakob, la recenzadon de l' libroj plenumas de 1920 G. Stroeel. Al la revuo ĉiam kunlaboris aro da bonaj verkistoj. (Kompilita laŭ UEA-Jarlibro 1933)

Esperanto: Kiaj perspektivoj jarcenton post la unua kongreso?

Claude Piron, sviso, profesoro pri psikologio, psikoterapiisto kaj verkisto, kontribuis al la bulonaj solenaĵoj per atentokapta prelego pri la nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto. (Daŭrigo/finio el la maja revuo.)

Pensmaniero tipa pri kvarjaruloj

Bedaŭrinde, esperantistoj estas influataj de la ĝenerala opinio. Kaj parto de ili emas akcepti ĝin. Ili tiel suferas disdiŝon, kiu povas esti doloriga. En ili ja vivas la sento, ke Esperanto, por ili, sukcesis, ĉar ĝi riĉigis ilian vivon. Sed tiun senton ili ne povas kunordigi kun la ĝenerala opinio, ke Esperanto malsukcesis. Estas do en ili streĉigo inter io socia kaj io individua, inter la dekstra kaj maldekstra duoncorboj.

Indas analizi, kion diras tiuj, kiuj ne dubas pri la fiasko. Se ni tion faros, ni unue konstatos, ke tiu konvinko estas absoluta. Homo, kiu diras: "Esperanto fiaskis", estas certa, ke tiu malsukceso estas evidenta, tuta kaj definitiva. Fakte, ĝi egalas liamense al "Esperanto estas nulo". Ĝi ekzistis kiel projekto, sed la projekto disfalas. Ĝi do ne plu ekzistas.

Interese, tiu impresio, ke la nuna ŝajna malsukceso estas io absoluta, tuta, definitiva, fakte povas aperi nur, se oni rezonas kiel infano malpli ol sesjara. Ĉiu el ni estas mense plenkreska nur pri kelkaj kampoj de la vivo. En multaj aliaj kampoj ni mense plu funkcias kiel kvar- aŭ kvinjaruloj. Kaj tial ĝis la menso ne povas kune teni pli ol du konceptojn, kiuj ĉiam estas simetriaj, kontraŭaj kaj ekstremaj: "granda" / "malgranda", "forta" / "malforta", "unua" / "lasta", "ĉio" / "nenio". Plenkreskuloj eĉ tre inteligentaj kaj mense tute kompetentaj en sia profesio aŭ en la ĉiutaga vivo, tamen plu funkcias laŭ la pensa sistemo de kvarjarulo en multaj kampoj, kiel politiko, religio, etnoj, maniero vidi sin mem, pritakso de la alia sekso (ofte ideoj pri la edzo aŭ edzino) ktp. Nu, Esperanto estas kampo, en kiu estas facile evidenti tiun prapensan funkciadon.

Ekzemple, multaj simple ne kapablas imagi, ke la nuna Esperanto diferencas de la lingvo, kia ĝi prezentigis en 1887. Tiaj homoj diras: "Vivanta lingvo evoluas, Esperanto ne povas evolui, Esperanto do ne estas vivanta lingvo, tial ĝi fiaskis". Ne temas nur pri malĝusta informiĝo; temas fakte pri nekapablo imagi, ke lingvo proponita de unu homo povas evolui. Et-infana pensmaniero! Eblas nur du terminoj: ĉu ĉio, ĉu nenio. Ekzistas Lingvo

Internacia de D-ro Esperanto de 1887, kaj tio estas ĉio, krom ĝi ekzistas nenio nomebla Esperanto. Tiuj homoj ne aplikas al Esperanto la saman rigardon kiel al aliaj realaĵoj. Urboj modifiĝas, ŝanĝiĝas stiloj, muzikoj evoluas, vesta modo tre diferencas de jardeko al jardeko, sed Esperanto restas definitive fiksita, kia ĝi estis en 1887.

Aŭ ni konsideru la manieron kompreni sukceson. Por multaj homoj Esperanto ne sukcesis, ĉar ĝi ne konkeris la mondon. Por ili, sukceso neprigus, ke oni povu iri ien ajn kaj alparoli iun ajn surtroutaŭ en Esperanto kaj esti komprenata. Sed tiun manieron koncepti sukceson ili ne aplikas en aliaj kampoj. Neniam ili pensus: "Honda-veturiloj malsukcesis, ĉar multegaj homoj uzas Toyota, Mercedes, Citroën, Ford aŭ ion alian." Oni aplikas al la sukceso de Esperanto kriteriojn, kiujn oni ne aplikas en aliaj kampoj. Interese, ĉu ne?

Historia perspektivo

Aloniĝas al ĉio ĉi nekapablo rigardi la aferon laŭ historia perspektivo. La rezulto estas ignoro de la koncepto "ankoraŭ ne", "ne jam", "ĝis nun ne". Refoje ni vidas, ke estas diferenco inter Esperanto kaj la aliaj kampoj de la vivo. Estas multaj terenoj en la socia vivo, sur kiuj homoj luktas por plibonigi la mondon. Ekzemple pri egaleco inter viroj kaj virinoj, inter nigrahaŭtuloj kaj blankhaŭtuloj, inter sociaj tavoloj rilate al ŝanĝoj povi studi, aŭ pri indiĝenaj rajtoj, komerca justeco inter nordo kaj sudo, kaj multaj aliaj. Ĉu homoj, kiuj preparolas tiujn temojn, pensas: "la lukto fiaskis"? Ne. Ili pensas: "Ni ankoraŭ ne sukcesis. Restas multo por fari." En 1700, jam estis homoj, kiuj luktis por elimini sklavecon. Sed en 1850 sklaveco ankoraŭ ekzistis. Ĉu en 1850 estus ĝuste diri "la lukto kontraŭ sklaveco fiaskis"? Ne. Historio instruas al ni, ke la sola ĝusta frazo estus: "En 1850 la lukto kontraŭ sklaveco ankoraŭ ne sukcesis". Sed neniam vi aŭdas homon certan pri la esperanta fiasko diri: "Esperanto ankoraŭ ne sukcesis". Kvazaŭ la lingvo disponis nur limigitan nombron da jaroj por konkeri la mondon, kaj ne atingis tiun celon antaŭ la fiksita limdato. Sed kial limdato? De kie limdato?

La ideo, ke Esperanto sekvas la ritmon de naturaj fenomenoj, kiuj kreskas eksponenciale, ne venas al ili en la kapon.



Eksponecia kresko estas malrapida komence, sed ĝi laŭgrade akceliĝas kaj post iu sojla momento iĝas rapidega. Tiuj, kiuj dubas pri la estonteco de Esperanto, ignoras historion. Pensu ekzemple pri la metra sistemo. Ĉi-lasto estis proponita de Gilbert Mouton, pastro en Liono, en 1647. Cent dudek jarojn poste, en 1767, nenio ĝi estis uzebla, ĉar konis ĝin nur kelkaj stranguloj. Ĉu oni tiam povis diri, ke la metra sistemo fiaskis? Tute ne. La sekvo de la historio montras, ke oni tiam rajtus diri nur: 120 jarojn post sia apero, la metra sistemo ankoraŭ ne sukcesis. Same, cent dudek jarojn post la apero de Esperanto, oni devas fari la hipotezon, ke eble Esperanto ankoraŭ ne sukcesis. Se sukcesi signifus universaliĝi, kio estas alia afero.

Tiu historia perspektivo povas helpi senigi je la streĉigo inter la subjektiva sento kaj la objektiva konstato, kiun mi antaŭe elvokis. Oni povas elekti la starpunkton: "Mi apartenas al avangardo". Efektive, la homoj, kiuj luktis por liberigi la mondon je sklaveco, aŭ por oficialigi la metran sistemon, pravis eĉ dum la tuta daŭro, dum kiu ilia agado restis ŝajne senrezulta, kaj ili estis rigardataj moke, kiel homoj kroĉitaj al ridinda utopio. Ni povas vidi nin en la sama situacio. Jes ja, eble ni eraras, sed la hipotezo, ke eble ni estas pioniroj, ne estas malpli probabla ol la kontraŭa, se kompari kun similaj agadoj en historia perspektivo.

Ni sondu la baldaŭ venontan tempon

Historia perspektivo utilas ankaŭ por pripensi pri tio, kio povos okazi post la nuna tempo. Tio estas delikata afero. Se oni esploras la konjektojn pri la posta verŝajna evoluo, faritajn de homoj, kiuj pretendas esti specialistoj, oni konstatas, ke tre ofte ili eraras, ĝenerale ĉar aperas ŝancaj okazaĵoj, neantaŭvideblaj, kiujn neniu enmetis en siajn kalkulojn. Tamen, en aliaj kazoj oni povas antaŭvidi sufiĉe ekzakte, kiel la aferoj disvolviĝos. Demografiaj prognozoj ĝenerale estas fidindaj, kaj same la prognozoj pri la disvolviĝo de epidemio.



Julio

01-03: Pedagogiaj Seminarioj en ICH (temoj: Faka lingvo, la Akademio de E-o, metodologio). ICH, Interkultura Centro Herzborg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983, ✉ esperanto-zentrum@web.de; <http://ich.sytes.net/index.html>.

01-03: 37-a Landa Amika Renkonto de Fervojoj Esperantistoj en Balassagyarmat. ☎ Phersy Ferenc, Hajló u. 11, HU-1046 Budapest, Hungario.

01-09: Esperanto-vojaĝo "Konu Mongolion" (virga naturo, popola vivmaniero kaj saĝeco, historiaj vidindaĵoj, muzeoj, folkloro koncerto, budhismaj temploj, antikva ĉefurbo Harahorum, Mongola Gobi-dezerto). ☎ Suno Centro, ✉ suno@mol.mm; <http://www.magincet.mml-suno/>.



02-09: 78-a SAT-Kongreso en Zagreb, Kroatio. ☎ Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio, ✉ satesperanto1@free.fr; <http://satesperanto.free.fr>; http://www.geocities.com/sat_hr/kongres2005.html.



02-09: Somera restado en Grésillon. ☎ Kastelo Grésillon, Kulturdomo de Esperanto, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33-(0)241891034, ✉ kastelo@gresillon.org; <http://gresillon.org/>.

03-16: Somera Esperanto-Tendaro SET-Lančov, Ĉeĥio, kun 50-jara tradicio. ☎ Klubo de Esperanto, Esperantistoj 3, CZ-674 01 Třebíč, Ĉeĥio. ☎/✉ +420 568 841 909, dum la tendaro 736 249 264,

Kalendaro 2005-2006

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fideindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembro numero.



☎ esperanto.trebit@volny.cz; www.set-lancov.cz.

04-22: NASK – Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto 2005, ĉe la monde konata interkultura altlernejo *The School for International Training* (Altlernejo por Internacia Trejnad) en nordorienta "nov-anglia" regiono de Usono. ☎ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono. ☎ 360-754-4563, ✉ eddyellen@aol.com; <http://esperanto.org/nask/progovevree.php>.



05-09: Staĝo en Kvinpetalo: Radiofonia teatro: perfektigo de la parolado; realigo de kompaktdisko (José Lafosse kaj Serge Sire). ☎ Kvinpetalo, Esperanto-Centro, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bourses, Francio. ☎/✉ +33 (0)5 49 42 80 74, ✉ informoj@kvinpetalo.org; <http://www.kvinpetalo.org/>.

07-10: 64-a Hispana Kongreso de Esperanto en Alcalá de Henares (Madrido, Hispanio). La temo: *Donkiĥoto parolas Esperanton*. ☎ Hispana Esperanto-Federacio; Rodríguez San Pedro, 13, 3º, ES-28015 Madrid, Hispanio, ✉ kongreso@esperanto-es.net; <http://www.esperanto-es.net/congreso2005/>.

08-10: 2005 Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj de Mezeŭropo en vilaĝo Hrašćina-Trgovište, Norda Kroatio. ☎ Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ☎ +385-1-4617550, ✉ +385 1 4619373, ✉ esperanto@zg.t-com.hr; <http://fishsup.ini.hul>.

09: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario, ☎ bajai@posta.hu; <http://fishsup.ini.hul>.

09-10: 1-a Mondcivilitana Esperanto-Renkontiĝo en Poreč, Kroatio. ☎ Mato Špekuljak, ✉ mato.spekuljak@zg.tel.hr; <http://free-zg.t-com.hr/cdm-hr/renkontighoj.htm>.

09-14: Mongola Nacia Festo (Malferma ceremonio, nacia lukto, pafarko, ĉeval-konkuro, muzeoj, folkloro koncerto, budhismaj temploj). ☎ Suno Centro (v. Centro Suno, 01 jul).

09-15: Internacia Esperanto-Konferenco 2005 en marborda urbeto Rafina, Grekio. Ĉeftemo: *Bizanca kulturo*. ☎ Eric Laubacher, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, FR-78180 Montigny-Bx, Francio. ☎ +30 16712645, ✉ +30 13236746, ✉ manha@otenet.gr; <http://osiek.org>.

09-16: Postkongreso de la 78-a SAT-Kongreso ĉe Adriatiko kun ekskursoj al Birjuni, Pula, tra Istria duoninsulo. ☎ SAT (v. 02 jul).

09-16: Nonoso 2005 – Memzorga tendumado en norda Nederlando. ☎ informu@nonoso.tk; <http://www.nonoso.tk/>.

09-16: Somera restado en Grésillon. ☎ Kastelo Grésillon (v. 02 jul).

09-17: 3-a NESTO – Naturista Esperantista Somera Tendaro en apudnijnegorodsko arbaro, Rusio. ☎ boogier@gmail.com; <http://boogier.chat.ru/nesto/>.

11-15: Naturamika Semajno en Grindelvaldo, Berna Kantono, Svislando. ☎ Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. ☎/✉ +41-32-9267407, ✉ kce.esperanto@blutwin.ch.

11-16: 15-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK) en urbo Plovdiv, Bulgario. Temoj: *Aktivigo de la imuna sistemo laŭ diversaj metodoj*. ☎ D-ro Imre Ferenczy, Pf 143, HU-9002 Győr, Hungario, ✉ FerenczyMD@aol.com; <http://www.esperanto.org/umea>.

11-28: Projekto "Tra Siberio". Unika ebleco viziti la lagon Bajkalo, traŭrante siberiajn urbojn: Novosibirskon, Tomskon, Novokuzneckon, Krasnojarskon, Irkutskon. ☎ <http://www.sciureto.front.ru/>.

12-16: Staĝo en Kvinpetalo: Inicito kaj unua praktiko de Esperanto por infanoj kaj plenkreskuloj. Praktiko de la lingvo, duagrada por infanoj kaj plenkreskuloj (Serge Sire kaj Liliane Bon). ☎ Kvinpetalo (v. 05 jul)

13-23: Renkontiĝo de Esperanto-Familioj. REF-2005 en la feriejo "Stanica Wodna" ĉe la lago "Mokre", Mazurio, norda Pollando. ☎ Lars Sözüer, Gablenzstr. 44a, DE-47059 Duisburg, Germanujo, ✉ lars.duisburg@gmx.de; <http://familioj.komputilo.org/ref2005.html>.

14-22: 15-a Internacia Esperanto-Kongreso en Rigo, Latvio. Temoj: *Folkloro kaj Turismo*. ☎ Māra Timermane, ✉ mtimermane@hotmail.com aŭ mtimermane@yahoo.com; http://www.geocities.com/mtimermane/Verda_Ondo.

15-20: Internacia intensa lingvokurso en Herzberg/Harz, Germanio. ☎ ICH (v. 01 jul).

15-23: 27-a Ĉebalta Esperantista Printempe en Mielno, Pollando. ☎ PEA-Filio en Koszalin. ☎ +48-(0)94-3404563 aŭ +48-503-417-825, ✉ barslavo@wp.pl.

16-21: Blankaj noktoj-2005 en Sanktpeterburgo, Rusio. ☎ Svetlana Ejst, ✉ sveta@esperanto.spb.ru.

16-23: Kultura Esperanto-Festivalo – KEF 2005 en Helsinko, Finnlando. Festivalo pri Esperanta kulturo: diversspeca muziko de roko al opero, danco, teatro, literaturo. ☎ Finna Esperanto-Junularo, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando, ✉ hamalainen.riitta@kolumbus.fi; riitta@artinar.com; <http://www.esperanto.fi/kef2005/>.



16-23: 17-a Ekumena Kongreso 2005 en Piliscsaba, Hungario (58-a kongreso de IKUE, 55-a kongreso de KELI kaj 7-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro). ☎ Farkas-Tatár Éva aŭ Bagi Irén, Baross u. 54/B, HU-1201 Budapest, Hungario, ✉ farkas-tatar_eva@externet.hu; <http://www.ikue.org/kong2005/kong2005.html>; www.chez.com/keli.

16-24: 28-a SEFT (Somera Esperantista Familia/Feria Tendaro) en Thomsdorf, Germanio. ☎ Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/0705, DE-17034 Neubrandenburg, Germanio. ☎ +49-(0)395-4221398, ✉ werner.pfennig@t-online.de.

17-30: Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lančov, Ĉeĥio. ☎ SET-Lančov (v. 03 jul).

18-22: Antaŭkongreso en Sankt-Peterburgo, Rusio. ☎ http://uea.org/kongresoj/2005/db_ak.html.

19-23: Staĝo en Kvinpetalo: Preparado al Altaj Studoj (skriba parto kun Janine Dumoulin kaj Michel Duc Goninaz). Esperanto kaj komputilo: Unikodo, reto, Vikipedio, OCR... (Serge Sire). ☎ Kvinpetalo (v. 05 jul).

19-23: 40-a Brazila Kongreso de Esperanto en Porto Alegre, ĉefurbo de la ŝtato Suda Riogrando en la suda Brazilo. Temoj: *Tutmondigo kaj frateco*. ☎ Lúcia Marlier, ✉ aluli@terra.com.br; http://lujz.org/bke/index_eo.html.

20-23: Konferenco de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo en Vilno, hotelo Panoramo. ☎ Aliĝiĝi mendebas ĉe Dieter Rooke, Aussere Klus 14, CH-4072 Oensingen, Svislando, ✉ dieter.rooke@tiscali.ch.

20-28: 45-a Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT) en Ĉuvaŝio. ☎ lingvo@tppchuwashia.ru; <http://www.tejo.org/rejm/oksejt/>.



23-30: 90-a Universal Kongreso de Esperanto, Vilno, Litovio. ☎ Litova Esperanto-Asocio, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎ +370-37-208503, -370-5-2391078, ✉ +370-37-228616, ✉ litova.ea@mail.lt; <http://www.esperanto.lt/uk2005/index.html>; ĝeneraj informoj ĉe UEA: <http://uea.org/kongresoj/index.html>.

23-30: Salto al Balto: 36-a Internacia Infana Kongreseto (IIK), apud Vilno. ☎ Komisiito: Stefan MacGill, Pannonia u. 30/1/6, HU-1136 Budapest, Hungario. ☎ +36-1-3495207, ✉ stefan.macgill@galamb.net aŭ surloke: S-ino Nijole Stakenienė, ✉ nijolla@omni.lt.



25-30: Bicikla Karavano Vieno – Zakopane. ☎ Katharina Tanzberger, ✉ TaKamasop@gmx.net aŭ Gregor Hinker, gregor.hinker@esperanto.at.

26-31: Staĝo en Kvinpetalo: Esperanto kaj komputilo: Unikodo, reto, Vikipedio, OCR... (Serge Sire). ☎ Kvinpetalo (v. 05 jul).



26-31: Progresiga kaj perfektiga kursoj de Esperanto en La Chaux-de-Fonds (Caŭdefono), Svislando. ☎ KCE (v. 05 jul).

30 jul-03 aŭg: Postkongresaj ekskursoj (Kaŭno-Klaipėda; Riga, Tallin; Sankt-Peterburgo). ☎ http://uea.org/kongresoj/2005/db_pk.html.

30 jul-05 aŭg: 38-a ILEI-Konferenco en Kaŭno, Interkultura komunikado en edukado. ☎ Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando, ✉ iei001@tiscali.nl.

30 jul-06 aŭg: 71-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Vilno. ☎ Irma Sabonyte, p.k. 559, LT-01014 Vilnius, Litovio. ☎ +370-67437524, ✉ irma.sabonyte@enkontrol.lt. Brajle: Alydas Valenta, Naugarduko 91, LT-03203 Vilnius, Litovio. ☎ +370-65997690, ✉ alydasvalenta@takas.lt.

30 jul-14 aŭg: 3-a SOMERE en Wissen (Siege), oriente de Kolonjo (Germanio). ☎ Lu Wunsch-Rolshoven, Esperantoland, ✉ lu.esperanto@ce.gmx.de; <http://www.esperantoland.org/somere/>.

30 jul-22 aŭg: Eŭropo-Afriko, rondvojaĝo tra LT-PL-DE-LU-FR-AD-ES-MA-ES-PT-ES-FR-MC-IT-AT-DE-PL. ☎ Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎/✉ +48-52-3461151, ✉ info@esperanto-turismo.com.



31 jul-07 aŭg: 61-a Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, Pollando. ☎ 61-a IJK, Ireneusz Bobrzak, ul. Toruńska 82 m 133, PL-03-226 Warszawa, Pollando, ✉ ijk@tejo.org; [ijk@tejo.org](http://www.tejo.org/ijk/2005/index.php); <http://www.tejo.org/ijk/2005/index.php>.

31 jul-13 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lančov, Ĉeĥio. ☎ SET-Lančov (v. 03 jul).

augusto

01-10: IEKursoj kaj somerumo ĉe la Sud-Nigramara bordo, Bulgario. ☎ lasto@mail.bg aŭ lastonikoo@Yahoo.co.uk.

01-14: Intensa kurso por kursestroj kaj instruistoj en Herzberg/Harz. ☎ ICH (v. 01 jul).

02-11: Konu Mongolion. ☎ Suno Centro (v. 01 jul).

02-12: Staĝo en Kvinpetalo: Muziko, kanzonoj - kun realigo de KD (Anne-Sophie Markov, Lino Markov, Guillaume Ternant). ☎ Kvinpetalo (v. 05 jul).

03-07: Esperantologia Fakultato, kun profesoroj Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo/historio), Usui Hiroyuki (interkulturaj

demandoj) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 11 jul).

06-12: Somera Festivalo, kunludo kaj kunstude en Barlaston, Britio. 3-nivela staĝo, eblecoj turismi. ☎ EAB, Esperanto Office, Station Road, Barlaston, Staffordshire. ST12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141, ✉ eab@esperanto-gb.org; <http://ourworld.compuserve.com/homepages/PGubbins/barlasto.htm>.

06-13: IKUE-tendaro en Sebrance, Ĉeĥio. ✉ svacekm@quick.cz.

06-13: Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-05) en Jelec. ☎ Daša Ivaniščenko, RU-399772 Jelec, ul. Oktjabrskaja 30-15, Rusio, ✉ barsik@yelets.lipetsk.ru.

06-15: Esperanto-ferioj ĉe Mediteranea Maro, Valencio, Hispanio. ☎ Esperantotur (v. 30 jul).



08-14: Internacia Junulara Semajno en Vác, Hungario. ☎ Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario, ✉ ijjs@ijjs.hu; <http://www.ijjs.hu/>.

09-13: Esperantologia Fakultato, kun profesoroj Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo/historio), Usui Hiroyuki (interkulturaj demandoj) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☎ KCE (v. 11 jul).

11-14: 4-a Esperanto-Kongreso de Nordoriento – Tri Provincoj kaj Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio kaj 2-a Internacia Vojaĝofesto de Esperanto de Ĉinio en Baotou. ☎ Liu Hui-qing, ✉ +86-(0)472-6987499, ✉ chenping7422@yahoo.com aŭ Chenping-es@sohu.com.

13-20: 9-a Internacia Renkontiĝo en Francio (Bretonio). ☎ Jean-Pierre Ducloyer, ☎ +33.2.99.09.71.92, ✉ jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr; <http://www.plouezec.fr/esperanto.html>.

14-19: Esti virino kaj verkistino en la hodiaŭa mondo (feminismo kaj literatura konferenco sub la aŭspicio de PEN-Klubo) en La Chaux-de-Fonds (Caŭdefono). ☎ KCE (v. 11 jul).

14-22: 14-a MELA (Memzorga Lagumado) en Délegyháza, Hungario. Sen aŭ kun vestaĵoj ripozaj, akvo- aŭ ŝlim-baniĝi. ✉ +36-30-2097864, ✉ DLSoap@gmx.net.

14-27: Riprestado en Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lančov, Ĉeĥio. ☎ SET-Lančov (v. 03 jul).

16-20: Staĝo en Kvinpetalo: Inicito al traduk-arto (Suzanne Bourof). Esperanto kaj komputilo: Unikodo, reto, Vikipedio, OCR... (Serge Sire). ☎ Kvinpetalo (v. 05 jul).

16-27: 39-a Internacia Esperanto-Feriado kun lingvaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, en Kudowa Zdroj, Pollando. ☎ Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław, Pollando, ✉ vroclavo@poczta.onet.pl; <http://vroclavo.republika.pl>.

17-28: Esperanto-Kunvenoj kadre de la Monda Junulara Tago en Kolonjo, Germanio. ☎ Ulrich Matthias, ✉ Ulrich.Matthias@t-online.de; <http://www.u-matthias.de/verein/ikue.htm>.

19-21: 24-a Komuna Seminario en Kamogawa, gubernio Chiba, Japanio. ☐ Japana Esperanto-Junularo. ☐ ks24@yahoo.com.jp; http://jei.jp/ks.

19-21: NOREK, la Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco en Sandman Hotel Downtown, Kalgario, Alberto, Kanado. ☐ canadamichelinebb@iname.com; http://www.esperanto-antauen.com/NOREK.



23-27: FESTO 2005 apud la lago de Saint-Peyres, en sudo de Francio. Ĝia temo: *Amo Ĉiam*. ☎ +33-2 40 69 48 95. ☐ ben@esperanto-jeunes.org; http://esperanto-jeunes.org/festo/.

23-27: Staĝo en Kvinpetalo: Esperanto kaj komputilo: Unikodo, reto, Vikipedio, OCR... (Serge Sire). ☐ Kvinpetalo (v. 05 jul).

20-27: 30-a Internacia Esperanto-Semajno en Sète ĉe Mediteraneo. Trinivela kursejo en agrabla feriejo kun baniĝado, ripozo, turismo. ☐ Esperanto, Culture et Progrès, 5 rue dr Roux, FR-34090 Montpellier, Francio. ☎ ☎ +33(0)467541543. ☐ jf.passarella@free.fr; http://perso.wanadoo.fr/nikolaosperanto.html.

23 aŭg-01 sep: Vizito en Mongolio laŭ spuroj de Ĝingis-Hano. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

25-28: 2-a Somera Universitato de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) en Lapoutroie, Francio ĉe germana limo. ☐ brunobambois@free.fr; http://www.e-d-e.org/.



25-29: 4-a Azia Kongreso en Nepalo. ☐ Ĝenerala sekretario, s-ro Bharat Ghimire, P. O. Box 180, Kathmandu, Nepalo. ☐ nespa_bharat@hotmail.com aŭ 4-a AK de Esperanto (ĉe NEspA), G.P.O. Box 8974 CPC 102, Kathmandu, Nepal. ☎ +977-1-4410524 (11:00-17:00 lundo-vendredo). ☐ esperanto@alink.com.np; http://www.jei.or.jp/kaem/kaem-AK4prokrasto.htm.

27-28: 27-a Somera Kunveno de Pakistana Esperanto-Asocio en Abbottabad. ☐ Pakistana Esperanto-Asocio, Centra Oficejo: Esperanto Markaz, Chowk Shahidan, Multan, Pakistano, ☐ saluton123@yahoo.com.

septembro

01-03: 1-a Landa Kongreso de Ganaa Esperanto-Movado. ☐ P.O.Box TS 404, Teshie Accra, Ghana W/A. ☐ abaako43@yahoo.com.



02-07: 73-a Itala Kongreso de Esperanto 2005 en Rimini, Italio. ☐ Comitato Organizzatore del Congresso Italiano di Esperanto, Viale Zavagli 73, IT-47900 Rimini, Italio. ☎ Mario Amadei +39-051-6446675. ☐ amadei.mario@yahoo.it aŭ duiliomagnani@iol.it.

03-04: 2005 La Jaro de Einstein en Scottish Churches House, Dunblane, Skotlando. ☐ Studrondo de Esperanto-Asocio de Skotlando, ☐ Hugh Reid, hugh_reid2@yahoo.co.uk.

05-14: Fiŝkaptado kaj ĉasado en Mongolio. ☐ Suno Centro (v. 01 jul).

05-24: Sesio de Pola Societo de AIS kun instruado de Esperanto, pola lingvo kaj kultur-turisma programo en Lublin. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

10-11: 4-aj Someraj Dialogoj en Esperanto-Restadejo. Debato, turismo kaj E-kurso. ☐ Salvador Aragay, Cami del Pou n-ro 9, ES-08691 Monistrol de Montserrat, Hispanio. ☎ 34645 404754.

10-18: Velura Sezone. 11-a internacia festivalo de Esperanto-kanto. ☐ Esperanto, p.k.74, Jalta-12, UA-98612, Ukrainio, ☐ espero@yalta.crimea.ua; tero@yalta.us; www.jaltaespero.narod.ru.



16-18: SEI-seminario (Sveda Esperanto-Instituto) en Lesjöfors, Svedio, kunlaboro kun Esperanto-Asocio de Finnlando. Temo: *Esperanto en literaturo kaj muziko en Finnlando kaj Svedio*. ☐ Lars Forsman, ☎ +46-(0)586-54811, ☐ larsespo@yahoo.se; http://svedaesperantoinstituto.4t.com/.

18: 8-a ERT (8-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga), Brazilio. ☐ tek.esperanto@ig.com.br

22-25: MontKabana Renkontiĝo en montkabano "Vila Velebita" (915 m) en vilaĝo Baŝke Oŝtarje, Kroatio. ☐ vanja.radovanovic@ericsson.com; http://www.angelfire.com/va2/Vanja/index.html.

24-25: Jarkunsido de E-Ligo en Malsupra Saksio, Germanio. ☐ ICH (v. 01 jul).

24-30: 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo en Bydgoszcz, kun la 28-a AKB Studadesio de AIS, okaze de Monda Tago de Turismo. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

25: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer (Germanio), je la 15-a horo.

26: Eŭropa tago de lingvoj en Herzberg/Harz, Germanio. ☐ ICH (v. 01 jul).

30 sep - 02 okt: Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznań, Pollando. ☐ Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL 61-002 Poznań, Pollando. ☎ +48-(0)602-283242, +48-61-8755879, ☐ janowczyk.pawel@poczta.onet.pl.

30 sep-02 okt: 5-a KoLoLoRES (kafoklaĉa kaj luda semajnfino) en Herne, Germanio, kun Esperanto-kurso por komencantoj. ☐ petra.dueckershoff@web.de; http://www.esperanto.de/kokolores.

oktobro

01-03: Internaciaj Pedagogiaj Tagoj en ICH (spertinterŝanĝo, konsultiĝo). Kunorganizanto: ILEI. ☐ ICH (v. 01 jul).



01-08: 13-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Calella, Katalunio, 80 km norde de Barcelono. Prelegoj, Premio Ada Sikorska, muziko, ekskursoj. ☐ Luis Serrano Pérez, Apartad 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio. ☎ +34 93727 5021, ☐ luis_serrano@mixmail.com; www.terra.es/personal5/liserrano2003/.

05-06: Staĝo pri Esperanto apud Nantes, Francio. ☐ Esperanto 44, Ferdi Vince, 13 rue du Docteur Schweitzer, FR-44600 St Nazaire, Francio. ☎ 0240704674.

06-30: Vojaĝoj al Usono por viziti Kalifornion, Alaskon kaj Havajon. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

06 okt - 25 nov: Kvar vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo kun vizito de San Francisco, Alasko, Havajo, Guamo, Tokio, Seulo, Bangkoko kaj ev. Laos kaj Kamboĝo. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

07-09: Ĝaja Semajnfino en Breisach, Germanio. ☐ Inge Simon, Brünner Str. 20, DE-73431 Aalen, Germanio. ☎ +49-(0)7361-360615, ☐ Inge.Simon@esperanto.de.

07-09: Pedagogiaj Seminarioj en ICH (temo: E-fondadoj, historio, metodologio). ☐ ICH (v. 01 jul).

08-09: 11-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago, unu el la 8 provincoj de Andaluzio, Hispanio. ☎ +34-95-2228960, ☐ j.herrero@transcemasas.es.

08-09: 37-a Korea Kongreso de Esperanto en Seulo. ☐ Korea Esperanto-Asocio, ☎ +82-2-7176974, ☐ pacamo@hanmail.net.

08-10: 12-a Aŭtuna renkontiĝo en Sylver Bay, Lake George, Novjorkio. Amikeca semajnfino (antaŭe konata kiel Okemo-Internacia Semajnfino Esperantista). ☐ Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal (Québec) H2G 2R8, Kanado, ☐ esperanto@sympatico.ca; http://esperanto.cam.org.

09-14: Memortagoj pri la IFEF-prezidinto Achim Giessner en Herzberg, Germanio. ☐ ICH (v. 01 jul).

10-16: InPaSem 2005 (Internacia Paroliga Semajno) en Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. Kurso por komencantoj (ne komencantoj!) kaj seminario por jamaj parolantoj. ☐ KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420-257-712201; +420-257-712126, ☐ info@kava-pech.cz; http://www.esperanto.cz/.

15-16: Pedagogiaj Tagoj. Konferenco de hungariaj E-instruistoj. ☐ Palma Csiszár, ☐ cspalma@freemail.hu.

21-23: 11-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Vyškov. ☐ Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Na vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio, ☐ Cea.polnický@quick.cz; www.esperanto.cz.

21-23: La 92-a Japania Esperanto-Kongreso en Jokohamo. La temo: *Rekonu Esperanton nun!* ☐ Japania Esperanto-Instituto, 162-0042 Tōkyō-to, Sinyūku-ku, Waseda-mati 12-3. ☎ 03-3203-4581, 03-3203-4582, ☐ esperanto@jei.or.jp.

25-29: Staĝo en Kvinpetalo: Incido kaj unua praktiko de Esperanto por infanoj kaj plenkreskuloj. Praktikado de la lingvo duagrada por infanoj kaj plenkreskuloj (Serge Sire kaj Suzanne Bourrot). ☐ Kvinpetalo (v. 05 jul).

29 okt-05 nov: 14-a Esperanto-Korusa Semajno ĉe Pirenoj sur gvidado de Carles Vela i Aulesa. ☐ Jorgos, FR-11420 Lafage, Francio. ☎ +33-(0)468-605417, ☐ jorgos@tiscali.fr.

novembro

03-06: Unua nacia kongreso de Esperanto-Federacio en Niĝerio. ☐ efen_2002@yahoo.co.uk aŭ afrikaoffice@hotmail.com.

04-10: Montgrimpi en Mongolio. ☐ Suno Centro (v. 01 jul).

05-06: 17-a Nordfranca Eŭropa Esperanto-Rendevuo en Morbecque-Le Parc, Francio. ☐ France Valet, 275 rue du Boulenniez, FR-59235 Bersee, Francio. ☎ +33-(0)320849609, ☐ f.valet@unadoo.fr.

05 nov - 11 dec: Kvin vojaĝoj kun mondvojaĝanto Remigiusz Mielcarek tra Tajlando, Laos, Kamboĝo kaj Vjetnamio, por viziti kaj partopreni Zamenhofajn Tagojn en Vjetnamio. ☐ Esperantotur (v. 30 jul).

11-13: Studo-semajnfino de Esperanto Nederland (Pluraj niveloj) en Vlaardingen. ☐ J. Smolders, Warmoesstraat 7, NL-1521 CH Wormerveer, Nederlando, ☐ studieveekeinde@unadoo.nl; http://www.esperanto-info.nl/bonvenon/studievees.php.

11-13: GRUPE-9 (Glivice-a Renkontiĝo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto) en la pola urbo Gliwice. ☐ Filio de PEA en Gliwice. ☎ +48-32-2326035 vespere, ☐ staman@esperanto.pl.

20: Esperantista prifesto de nova vino de Marĉelo Trampuh. ☎ +385-91-5283491, ☐ marcello@trampuh.com.

20: Esperanto-Meso en la katedralo de Speyer (Germanio), je la 15-a horo.

decembro

04-08: Antaŭkongresa ekskurso de la 8-a Nacia Kongreso de Esperanto en Meksikio. ☐ Luis Raudón, ☐ traudon@yoli.com.mx.

05-09: 2-a Internacia Konferenco de la Naturkuraca Asocio en Sanhajo, Ĉinio. Temo: *Maljuniĝo kaj naturkuracado*. ☐ Internacia Naturkuraca Asocio, s-ro Wang Xigeng, Chizhou China Travel Service No.11 Changjiang Road (S), Chizhou, Anhui, CN-247000, Ĉina P.R. ☎ ☎ +86-13905669864 (24-hore), +86-566-2037171 (oficejo). +86-566-2031155, ☐ wxespero@hotmail.com aŭ s-ro Harald Schicke, Schoolbrink 12, DE-27383 Hetzwege, Germanio, ☎ +49-(0)4263-94087, +49-(0)4263-94088, ☐ MZVerlag@web.de.

09-11: Pedagogiaj Seminarioj en ICH (temo: Gramatikaj aferoj, didaktiko, interlingvistiko). ☐ ICH (v. 01 jul).

09-11: VI-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. ☐ Bjalistoka E-Societo kaj Fondajo Zamenhof, str. Piękna 3, pk. 67, PL-15-269 Bjalistoko, Pollando, ☐ elakarczewska@interia.pl; esperanto.bialystok@interia.pl.

09-11: 8-a Nacia Kongreso de Esperanto en Acapulco, Meksiko. ☐ Luis Raudón (v. 04 dec).

16-18: 59-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo kun Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA de ambaŭ niveloj. Diversnivela lingvokurso, prelego de d-ro Aldo Foà, ekumena deservo kaj abunda kultura programo. ☐ Saarländischer Esperanto-Bund e.V., Sarlanda Esperanto-Ligo r.a, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken, Germanio; Gen. Sekretario Jawaid Eahsan. ☎ +49-6332-981190, ☐ sel@esperanto-info.net.

24-25: 28-a Jara Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio en Lahore. ☐ Pakistana Esperanto-Asocio, Esperanto Markaz, Chowk Shahidan, Multan, Pakistano, ☐ saluton123@esperantoLand.org.



27 dec-03 jan: 22-a Internacia Festivalo (la tradicia novjara aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj) en Trier, Germanio. Kadra temo: *Eŭropa pligrand-igita*. Ekskurso al najbara Luksemburgio. ☐ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎ ☎ +49-5624-8007, ☎ +49-171-4964558. ☐ HDP@internacia-festivalo.de; http://www.internacia-festivalo.de.

28 dec-08 jan: 4-a Novjara Renkontiĝo en Frankfurt/Main. ☐ EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. HH, 3. OG, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49-(0)30-6855831, ☐ lu@esperantoland.org; http://www.esperantoland.org/nrl.

aprilo



29 apr-09 maj: La 18-a lingva Esperanto-festivalo Aroma Jalta, Ukrainio. ☐ p.k. 35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ☎ +380-44-2851701, ☐ volodimir_h@yahoo.com; www.aromajalta.by.ru.

majo

06-12: 58-a IFEF-Kongreso en Sanhajo, Ĉinio. Komuna vojaĝo el Eŭropo. ☐ István Gulyás, Rákos u. 98, HU-1155 Budapest, Hungario, ☐ kozsu13@freemail.hu.

25-28: 100-jara jubileo de Germana E-Asocio en Braunschweig. ☐ ICH (v. 01 jul).

julio

08: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. ☐ bajai@eposta.hu; http://fishsup.ini.hu/.

23-28: Scienca Konferenco okaze de la Centjariĝo de ISAE en Tavoleto, Italio. ☐ D-ro R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege, Germanio.



29 jul-05 aŭg: 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Firenco, Italio. ☐ Itala Esperanto-Federacio, ☐ fei@esperanto.it; http://www.ukflorenco2006.it.

novembro

Konferenco pri Scienca Aplikado de Esperanto, KAEST-2006 en Dobřichovice (20 km de Prago). ☐ KAVA-PECH (v. 10 okt 05).

konstante

01 majo - 31 sep 2005. Internaciaj Esperantaj Somerumoj ĉe la Sud-Nigramara bordo en Bulgario, por esperantistoj kaj neesperantistoj. Esperanto-kursoj kaj aranĝoj nur por grupoj. ☐ lasto@mail.bg aŭ lastonikor@Ydho.com.uk.

Deservo en Esperanto en Londono en ĉiu 2-a dimanĉo de monato je 15.15. Metodita Preĝejo, Hinde Street, London W1. ☐ Kevin Bourne, ☎ +44-(0)1737-248532.

Se vi volas vidi mapon de E-aranĝoj, iru al www.Esperantoland.org

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe: www.eventoj.hu/kalendar.htm

Mi revenas al la ideo, ke la angla venkis. En la mediteranea regiono, en la unua jarcento de nia erao, oni povis diri la samon pri la greka, eble ne la klasika greka, sed simpla fuŝa greka, kiel oni hodiaŭ en kelkaj medioj diras, ke la mondlingvo estas "simpla fuŝa angla". En Eŭropo, en la dekunua jarcento, oni povis diri, ke la latina venkis. En la dekoka, ke venkis la franca. Sed ni scias, kiel historio evoluis, ĉiuj ĉi lingvoj poste perdis sian superregadon. Kaj la koncerna ŝanĝoj sekvis la ŝanĝojn en la politika-ekonomia vivo internacia.

Nu, la superregado de la angla lingvo en nia tutmonda socio estas ligita al la superregado, politika kaj ekonomia, de Usono. La faktoj nun disponeblaj ebligas konjekti, ke eble Usono jam komencis sian dekadencan. Tiu ideo estas eksplacite prezentita en oficiala raporto de la Centra Informa Agentejo usona (CIA), disponebla de nelonge. Mi iom timas aliri tiun kampon, ĉar kelkaj certe riproĉos al mi, ke mi enmiksas min en politikon. Tamen ne temas pri politiko, sed pri konsideroj pri io ebla, io, kio povas okazi, ĉar tio kontraŭdiras nek la faktojn nek logikon, sed kio ankaŭ povas ne okazi. Kio okazos, neniuj scias. Sed multegaj seriozaj komentistoj pensas, ke post kelkaj jardekoj la politika kaj ekonomia superpotenco estos alianco inter Ĉinio, Barato (tio estas Hindio) kaj Brazilo. Tiuj estas la landoj, kiuj plej rapide kaj certe disvolviĝas, kaj kun giganta potencialo. Sekve, multaj fakuloj opinias, ke la venonta mondlingvo estos la ĉina. Kaj fakto estas, ke kursoj de la ĉina lingvo allogas pli kaj pli da homoj de jaro al jaro.

Kio ebligas diri, ke eble – kaj mi substrekas tiam eble – Usono nun rapide kuras al sia perdiĝo, al kolapso? Multaj faktoj.

Ni konsideru ekzemple la ekonomian situacion. La usona ekonomio estas bazita sur ege facile disrompebla sistemo, kiun eblas resumi



Solena inaŭguro en la urba teatro (kongresejo en 1905)

dirante: la mondo produktas, kaj Usono konsumas. Tio jam validis pri industriaj varoj, sed en 2004 la unuan fojon dum multaj jardekoj, Usono estis neta importanto de manĝaĵoj. La usona agrikulturo ne plu sukcesis nutri la loĝantaron. La komerca deficito de Usono atingis nun 630 miliardojn da dolaroj. Por paĝi tiujn ŝuldojn, Usono devas ricevi el la resto de la mondo proksimume unu miliardon da dolaroj ĉiutage. Ĉu tiasisteme eblas eviti bankroton? La

ĉefa ŝtato, kiu ebligas al Usono finance vivteni sin, nun estas Ĉinio, kies pluso en la komerca bilanco de Usono estas 160 miliardoj da dolaroj. Tio koncernas la rilaton inter importoj kaj eksportoj, do, la privatan ekonomion usonan. Se nun ni turnas nin al la publika, al la ŝtato, ni konstatas, ke ties financaj aferoj estas eĉ pli malprosperaj. La sumo de la nacia ŝuldo estis hieraŭ 7,79 bilionoj da dolaroj, t.e. 7,7 milionoj da milionoj da dolaroj aŭ 7,7 miliardoj da dolaroj. (Kiam Bush farigis prezidento en 2001, li heredis de Clinton kasojn tute plenajn: ne ekzistis ŝtata ŝuldo tiutempe). Kaj la plej grandan parton de tiu sumego Usono ŝuldas al aziaj landoj: Ĉinio, ekzemple, pruntedonis al la Usona Trezorejo 83 miliardojn da dolaroj. Tiu ŝuldo rapide kreskas. La iraka aventuro ja kostas al la usona ŝtato 5,8 miliardojn da dolaroj ĉiumonate. Estas dubo, ĉu iu ŝtato povas longe pli funkcii kun tiel giganta nacia ŝuldo. Pro ĝi, cetere, la usona dolaro perdas pli kaj pli de sia valoro, tiagrade, ke la naftoproduktantaj landoj, t.e. la petrolandoj, pli kaj pli konsideras la eblon ne plu akcepti pagojn en dolaroj, sed igi la eŭron la referenca valuto por la naftokomercio.

Multaj aliaj faktoj indikas katastrofan evoluon de Usono, kiel la reduktiĝo de la mezuma salajro, la ĉiujara kresko de la proporcio de homoj sub la mizersojlo, la nombro de malliberuloj – la plej granda el la tuta mondo (2,2 milionoj, dum en 1975 estis nur

380 000), kiu restas la plej granda eĉ se vi kalkulas proporcio al la loĝantaro – la fakto, ke la militaj fortoj estas tro vaste dismetitaj eksterlande aŭ la fakto, ke, kiel en Sovet-Unio antaŭ ties disfalo, la distanco inter objektivaj faktoj kaj subjektivaj impresoj estas aparte granda: ekzemple, kvankam ĉiuj oficialaj dokumentoj de la usona ŝtato montras, ke Irako ne ludis rolon en la atako kontraŭ la novjorkaj turoj, pli ol 50 elcentoj el la usonanoj, se fidi sondaĵojn, estas konvinkitaj, ke la koncerna pilotoj havis irakan naciecon.

Komprenu min bone, mi ne diras, ke Usono tute certe baldaŭ kolapsos. Mi ne scias. Neniu scias. Eble ĝi sukcesos per mirinda fortostreĉo, je kiu la usona loĝantaro estas perfekte kapabla, eble pli kapabla ol multaj aliaj popoloj, restarigi sian situacion. Estas en la usona loĝantaro vastega potencialo de energio, kuraĝo, klarvidado, kaj fundfunde utila optimismo, kiun la lando eble sukcesos ekspluati. Mi diras nur, ke se oni komparas kun la superpotencoj de la historio antaŭ ilia disfalo, oni retrovas la samajn trajtojn en la nuna Usono.

Kiel ĉio ĉi rilatas al Esperanto? Tio rilatas al ĝi simple per tio, ke la superreganta lingvo ĝenerale estas la lingvo de la superreganta lando. Se la statuso de superpotenco transiros de Usono al alianco inkluzivanta Ĉinion, Baraton (t.e. Hindio) kaj Brazilon, estas antaŭvideble, ke post iu tempospaco la homoj diros al si: kial plu uzi inter ni la anglan, malfacilan lingvon fremdan al niaj kulturoj? Tiam eble ili emos alpreni la ĉinan kiel mondlingvon, ĉar en tiu alianco Ĉinio pezos per pezo aparte grava. Sed la ĉina estas eĉ pli malbone adaptita ol la angla al internacia uzado. Por sia skribo kaj pro sia prononco. Tiam estas ŝanco, ke la homoj rimarkos, ke

Esperanto disponeblas kaj perfekte taŭgas por tiu rolo.

Se vi opinias, ke mi komplete misjuĝas la faktojn kaj iliajn eblajn sekvojn, mi tuj koncedas, ke eble vi pravas kaj ke mi povas komplete malpravi. Sed, nu, oni petis min diri, kiel mi imagas la perspektivojn por nia lingvo unu jarcenton post la unua Esperanto-Kongreso, kaj tion mi diras, kiel eble plej sincere. Fakte, ĉio, kion mi diris ĝis nun, estis simple plenigo de la tempo disponigita al mi por ĉi tiu parolado. La fundo de mia penso estas multe pli simpla. Mi kredas je Esperanto, mi kredas, ke ĝi estos la mondlingvo, ĉu post dudek jaroj, ĉu post cent, ĉu post tricent, tion mi ne povas diveni kaj tio estas al mi egala.

Mi kredas je ĝi pro iu nevenkeble potenca intuicio, kaj mi ne ofendiĝos, se oni taksos min tiurilate freneza. Sed se tiu freneza zono en mi malbonfartas al neniuj, kaj lĝas min pli feliĉa, kial mi hontus pri ĝi kaj ĝin forĵetos? Kredi je tia intuicio povas esti freneze, sed ankaŭ povas esti io mense tute sana. Mi ja povas konfirmi mian manieron rigardi la venontajn jardekojn per raciaj, faktaj argumentoj, kiuj ne malpli valoras ol la argumentoj de la homoj, laŭ kiuj Esperanto ne havas estontecon. Tamen ne pro tiuj argumentoj mi kredas je ĝi, nur pro iu kvazaŭ mistika neklarigebla certeco, pri kiu ne eblas diskuti, ĉar ĝi radikas en mia dekstra cerba duonsfero. Ĉi-lastas, se oni sukcesas ekspluati ĝiajn pozitivajn aspektojn, povas prezentiĝi kiel mirinda, eksterordinara ĝardeno, ĝardeno, kie floras beleco, amikeco, fantazio, gajeco, kreemo. Kaj tiu mia kredo havigas al mi tiom da ĝojo, ke eĉ se ĝi montriĝos erara laŭ vidpunkto historia aŭ socia, ĝi ĉiam estos por mi, laŭ individua, amikeckrea kaj animirikiĝa vidpunkto, trezoro, kies valoro superas ĉiujn eblajn homajn kalkulojn. Jes, nia dekstra cerba duonsfero enhavas, en sia paradiza parto, grandegan potencialon da plezuro kaj energio. Kiom mi dezirus, ke ĉiuj esperantistoj kapablu iri plaĉe promeni en ĝi! Kaj ke ĉiuj homoj sekvu ilin tien kaj tie. Tiam ja la bela sono de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos.

Recenzoj

Utila legaĵo pri la kongresoj

Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005. Ziko Marcus Sikosek. Rotterdam: UEA, 2005. 197p. 24cm. ISBN 9290170875 (bind); 9290170867 (broŝ). Prezoj: (bind) € 30,00; (broŝ) € 21,00

Al esperantisto UK plej ofte donas multe da "ebriiga internacia etoso". Tial Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj estas gravega parto de la Esperanta Kulturo, kiu nun priskribigas en ampleksa tema verko. La verkinto serioze esploris trafoliument amason da libroj kaj revuoj en la CO de UEA kaj intervjuante plurajn aktivulojn en la movado. La rezulto estas alloga libro kun priskribaj tekstoj, fotoj pri homoj kaj afiŝoj kaj kolekto da anekdotoj el la historio de la UK-oj.

La Ĉapitro *Reguloj kaj homoj* traktas formalaĵojn pri organizado de la UK-oj. La unuan organizis la franca advokato Alfred Michaux. Poste organizaĵoj kiel KKK, IOK, ICK, UEA kaj IEL planis la kongresojn kun helpo de kongressekretarioj ĝis la nuna Clay Magalhães.

La ĉefaj Ĉapitroj de la libro tamen traktas la unuopajn kongresojn. Dum la *Kongresoj en la belepoko* (1905-1915) la etoso estis aparte entuziasma, kvankam lingvaj demandoj estis nebonvenaj pro la Ido-krizo. *Kongresoj inter la mondmilitoj* (1920-1939) kaj la *Kongresoj dum la malvarma milito* spertis malfacilaĵojn vojaĝi dum kaj post militoj kaj



akuzojn pri neneŭtraleco dum kongresoj en nedemokratiataj landoj kaj iam malbonan lokan organizadon.

Ankaŭ *Kongresoj post la falo de la muro* spertis malfacilaĵojn vojaĝi pro malsimilaj ekonomiaj eblecoj de anoj de malsamaj landoj. Pro tio la UK-oj restis ĉefe Eŭropa fenomeno, kvankam nun ĉirkaŭ ĉiu tria UK okazas ekster Eŭropo. Ankoraŭ UK neniam okazis en Afriko kvankam invitis kaj Madagaskaro kaj Sud-Afriko.

Se la malfacilaĵoj estis malsamaj, la ĝeneralaj impresoj pri la diversaj kongresoj tamen estas similaj kaj tre pozitivaj: unika ebleco utiligi Esperanton, kultura okazaĵo, pli festivalo ol kongreso, riĉa ebleco turismi, sciencaj prelegoj, fakaj kontaktoj kaj multaj belaj anekdotoj pri okazaĵoj.

Citaĵoj en la libro donas ekzemplojn pri malnoviĝintaj E-vortoj, presitaj kursive kun la moderna versio interkrampe. La lingvaĵo kaj aspekto de la libro estas bonaj. Ĝi estas utila legaĵo por ĉiuj, kiuj vizitis UK-on kaj por tiuj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri la movado.

Leif Nordenstorm

Sur la lingvonormigaj spuroj de E. Wüster

Terminologiaj konsideroj. Jan Werner. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. 180p. 21cm. ISBN/ISSN808585371X. Prezo: € 15,90

Ne hazarde, la internacian terminologian normigon komencitan en la 1930-aj jaroj pionire gvidis elstaraj esperantologoj kiel Eugen Wüster kaj Eeñest Drezen. Por diversaj kaŭzoj tiu grava ekstermovada pozicio de Esperanto tute perdiĝis kaj la terminologia scienco plu evoluis sen referenco al ĝi. Tamen eblas konstati diversmomente tra la jardekoj kelkajn klopodojn sisteme alfronti la ĉi-kampan Esperantlingvan postrestintecon, fare de homoj kiel Rudolf Haferkorn, Rüdiger Eichholz, Wera Blanke k.a. Ĉi tiu verko bele prezentas altvaloran rikolton de la longtempa laboro de unu el ili, la ĉeĥa inĝeniero Jan Werner.

Trafe kolektitaj en kvin partojn (teorio, principoj, leksikaj observoj, prilingvaj konsideroj, terminologia terminaro), la diverstemaj tekstoj ne nur serioze kaj kohera aliras la kompleksan problemaron de la Esperantaj faka apliko kaj terminologio, sed evidentiĝas ĉe la verkinto profundan scion pri la lingvo kaj rigoran esplordan de la studkampoj. Diversloke tra la verko legeblas liaj argumentoj plede al kolektiva, demokrata kunlaboro por la stabiliĝo kaj normigo de la terminarioj surbaze de la procedo analizo-sistemigo-klasifikado-difinado de nocioj, kontraŭ la spontana evoluo, laŭ sole individua eksperimentado. La terminologia principaro



estas detale prilaborita (sistemeco, motiviteco, laŭreguleco, bonsoneco, vorta ekonomio, vortara ekonomio, internacieco ktp), esprimante racian starpunkton pri la potencialo de la skema strukturo de Esperanto por terminigo, ankaŭ koncerna la necesan enkondukon de internaciaj terminoj. Ĉi-teme profesoro Werner prave atentigas pri la ĝenerala neglekto al la dua parto de la 15-a regulo de Zamenhof, kies rezulto estas evitinda naturalisma penetro en la lingvan sistemon.

La libro certe plenumas la deziron de la verkinto vekti interesiĝon pri la speciala (faka) lingvo, cetere

esenca por la disvolviĝo kaj estonto de Esperanto, pro la nuntempa graveco de scienco kaj teknologio (jes ja, la verko estas bele 'hoisma'). Tial, espereble ankaŭ lia instigo al establiĝo de E-organo skvanta la linion kaj normojn de ISO (International Organization for Standardization) estos fekunda. Tiel, la E-komunumo vere profitus de la giganta laboro iniciatita de unu el ties plej gravaj membroj (E. Wüster).

W. Auld iam resumis unufaze la Ido-krizon kiel la apartiĝon disde Esperanto de tiuj kiuj preferis ludi per ĝi anstataŭ labori por ĝi. Mi timas ke klasigo tia daŭre validas, sed feliĉe ekzistas seriozaj, sindonaj reprezentantoj de la dua kategorio, kion ĉi tiu kolekto pravas.

José Antonio Vergara

Vojaĝo al libero

Sensorteco. Imre Kertész. El la hungara István Ertl. Budapest: Aranygolyó, 2003. 207p. 20cm. Bind. Numero 37 en la serio **Oriento-Okcidento**. ISBN 963206217 5. Prezo: € 13,50

Kun rimarkinda rapideco la eldonejo Aranygolyó (Orglobo 2002) eldonis sub la redaktado de Oszkár Princz la Esperantan tradukon far István Ertl de la Nobelpremiita romano **Sensorteco** de Imre Kertész.

Bedaŭrinde, la recenzo ne sekvis same rapide. Ne, ne skribi la recenzojn estis malfacile, sed legi, pli ĝuste eklegi la romanon. Mi havis la saman senton, sed de la kontraŭa direkto, kiel Humphrey Tonkin, eĉ se mi ne kapablas formuli ĝin tiel eleganta: kiel denove disŝiri la vundojn, kial rerakonti la malnovan historion? Ĝa ĉiuj konas ĝin: *Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis [...] Nu, kion plu diri?* Kial denove priplori Hekubon, se ŝiaj larmoj jam delonge sekigis?

Nu, sed la tempo urĝis, la redaktoro premis, kaj finfine mi eklegis la romanon. Kaj mi legis ĝin senhalte, seninterrompe, preskaŭ senspire, ĉar ĝi estas granda romano, unu el la plej grandaj, kiujn mi iam legis. Ne, Imre Kertész ne volas eligi larmojn. Li cizelis por si glatan, egalan, senpasian stilon, kiun oni povas senhezite akcepti kiel tiun de dekkvinjara knabo, sensperta, kelkfoje eĉ naŭva, kiun oni fortrenis de liaj gepatroj rekte en la koncentrejo. La knabo rakontas siajn travivaĵojn, eĉ la plej terurajn – terurajn por ni, ĉar plejparte li eĉ ne perceptas ilin tiaj – preskaŭ sen komentoj, tute neŭtrale, senemocie, eble, kelkfoje, iom mirigite. Nur unu fojon mi sentis lin emociita, ĉe la ekzekuto de la rekapititaj forfuĝintoj, kiam la rabeno ekurmuras la kadiŝon, kaj la tuta *lager**, bloko post bloko, vico post vico, kunmurmuras: *jiskadal, vejiskadal*. Sed eble ankaŭ tio estis nur mia emocio, ne lia.

La knabo perceptas siajn travivaĵojn kiel vojaĝon, kaj fakte ili estas vera odiseado, kun la brikfarejo por la groto de la ciklopo, kun Ĉajko por la insulo de Cirko kaj la *zal zeks*** por tiu de Kalipso. Aŭ, pli ĝuste, ĝi estas speco de inicada vojaĝo dum kiu, kun ĉiu ŝtupo, li mergiĝas en suferojn kaj mizeron, ĝis la kvazaŭa forperdo de sia homeco. Kaj je la fino de tiu inicado, sur la plej profunda ŝtupo de tiu submergiĝo, dum li kuŝis sur malvarma pajlo humida pro diversaj suspektaj likvaĵoj, sur skuĝanta vagonplanko, dum la flamo de la vivo apenaŭ flagretis, apenaŭ bruletis en li, okazis io tiel neatendita, io tiel eksterordinara, ke apenaŭ oni emas ĝin kredi: *unuafoje mi estis kapita de la malkutima, nenormala, iu timema, kvazaŭ mallerta sento – eventuale la amo, mi kredas*. Por mi, ĉi tiu bruletanta, flagretanta, nekredibla amo estas la ĉefa mesaĝo de la romano, kaj ne tiu spite provoka *Malamon...mi malamas...ĉiujn*, kiun, fine de la romano, jam ree en Budapeŝto, li alĵetas al la demando de la ĵurnalistoj.

La lasta linio de la romano respondis ankaŭ al miaj komencaj duboj pri la senco de la rememoro. Jes, oni devas rememori la historion, por ne forgesi ĝin. Ĉar la forgeso minacas ne nur tiujn, kiuj kredas jam koni la rakonton, sed ankaŭ tiujn, kiuj travivis ĝin. Tial oni devas paroli. *Se ili ja demandas. Kaj se nur mi mem ne estos forgesinta*. Sed mia plej granda surprizo estis konsciigi, ke mi misinterpretis la vorton *sensorteco*. Ĝi ne aludas la forrabitajn ĵunecon de la heroo, György Koves, nek la forrabitajn vivojn kaj destinojn de la milionoj kiuj ne transvivis la koncentrejojn, sed la liberecon: *se ekzistas sorto, tiam ne eblas libereco; sed se*

ekzistas libereco, tiam ne estas sorto, aŭ pli bone dirite [...] ni mem estas la sorto. Oni povas do kompreni kial la komunisma diktaturo prisilentis la romanon kiu, krome – meze de la plej gaja barako de la socialisma tendaro – aŭdacis proklami ke en koncentrejo ĉio tio [mankoj, mizeroj, malsato, batoj] estas komprenebla [...] sed la koncentrejo en si mem ne estas komprenebla!

La verko kaj la persono de Imre Kertész estas malkomfortaj ankaŭ por certaj dekstrulaj nostalgianoj, kiuj volus minimumigi aŭ forgesi la kontraŭjudajn krimojn. Kertész estas honesta atestanto – unu el la ŝlosilaj vortoj de *Sensorteco* estas *honesto* – kies atestaĵoj oni ne povas tutsimple flankenŝovi. Oni ne povas akuzi lin pri kunlaborado kun la komunisma diktaturo, nek pri manko de patriotismo: ĉi tiu homo revenis el la koncentrejo al Budapeŝto kaj decidis resti en Hungario ankaŭ post 1956. Li verkadis en la hungara, la lingvo kiun li plej bone konas, kaj gajnis per sia hungarlingva verko – por si mem, sed nedisigeble de la hungara literaturo – la Nobelpremio. Kaj tamen oni atakadis lin furioze kaj senracie, eĉ – kiel konfesis du el liaj kontraŭuloj en televida elsendo – sen legi nur unu linion de li. Eble pro tio ili ne konsciis, ke Kertész jam delonge ridindigis ilin en la figuro de la bakisto.

Ŝajne mi nenion diris pri la traduko mem, sed tio estas nur ŝajno, ĉar ĝuste pri la Esperanto-traduko mi parolis ĝis nun. Ja mi legis la romanon – senhalte, seninterrompe, preskaŭ senspire – unue en la Esperanto-traduko, kaj estis nenio en la traduko, kio ĝenus tian legadon, kaj mi trovis nenion ĝenan eĉ dum la posta komparo kun la hungara originalo. Jam delonge mi enviis la tradukinton, István Ertl, ĉar li hungarigas *La infana raso*-n de Auld. De nun, mi enviegas lin ankaŭ ĉar li elhungarigas la *Sensorteco*-n de Kertész.

Jozefo E. Nagy

La angulo de



Esperantlingva Verkista Asocio
<http://www.everk.org/>

Clarence Bicknell: El: «Aŭtuno»

Mallaŭta voĉo de l' venonta vintro tra nia norda lando ekurmuras; la floroj velkas sub ĉielo griza, hirundamiko aliloken kuras.

La gloro de l' somero jam finiĝis: la fruktojn ni rikoltis kaj la grenojn; nin kaptas iom da pensad' malgaja, eĉ forgesante la pasintajn benojn.

[...]

Nek de l' printempo la mantelo verda, nek de l' somer' la rozokrono suna, valoras la trenajon fajrsimilan, la orbrodaĵon de l' vestar' aŭtuna.

Malmulto estas konata pri la anglo Clarence Bicknell (1842-1918) krom la fakto ke li estis anglikana ekspastro, doktoro pri matematiko, kaj ke li longe vivis en Italio. Fakte li loĝis en Bordighera, aktivis i.a. kiel botanikisto kaj pentristo, kaj fondis la Muzeon de Okcidenta Ligurio, kiu ankoraŭ nun portas lian nomon. Lian amon al naturo atestas kaj lia vivo kaj liaj postrestintaj versaĵoj.



Laste Aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

100 zamenhofaj proverboj. Nora Caragea. Frankfurt am Main: la aŭtoro, 2005. 52p. 15x21cm. 100 proverboj deĉifrendaj el "nekonata skribo". € 10,80

Anton Ĉeĥov en Esperanto. Aleksander Korjenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2005. 19p. 21cm. N-ro 1 en la serio "Sed ne el katedro". Prelego prezentita okaze de la centjariĝo de la morto de Ĉeĥov. € 3,30

Bibliografio de la verkaro de Adolf Burkhardt. Reinhard Hauptenthal. Schliengen: Iltis, 2005. 20p. ISBN 3932807472. 21cm. € 3,30

Esperanto, L' – l'essentiel. Zohra Mraihy, Thierry Saladin. Ilustris Jala. Vichy: Aedis, 2005. 8p. ISBN 2842592638. 22cm. En la franca. Bele ilustrita faldfolio kun ĉefaj informoj pri Esperanto. € 2,70



Lingvo-inventado en la Danuba monarkio (1821-1918). Otto Back. El



la germana trad. R. Hauptenthal. Schliengen: Iltis, 2005. 39p. ISBN 3932807367. 21cm. Artikolo origine aperinta en la germana, poste en Esperanto en *Esperante kaj ekumene*. € 6,60

Nanatis. Robert Dutil. Ilustris Martine Saura. El la franca trad. E-Societo Kebekia. Montrealo: la tradukinto, 2005. 114p. ISBN 2980624616. 18cm. Ilus. Ĉarma mirrakonto pri la aventuroj de soleka kanuisto en la nordamerika nordoriento kaj pri la mondo kiun li malkovras tie. € 11,70

Ni lernas kaj ludas. Lernolibro de Esperanto por infanoj de 8 jaroj aŭ pli junaj. La unua jaro. Stanislova Adomaskienė. Marijampolė, 2005. 32p. ISBN 9955665017. 29cm. Plene ilustrita lernolibro uzebla internacie. € 6,00

Requiem. Antanas Poška. El la litova trad. V. Beinortienė. Kaunas: Varpas, 2005. 270p. ISBN 9955646055. 20cm. Du-lingva (E, litova). Pripensajoj pri la vivo de la homo, pri ĝia celo sur la Tero kaj kredo al pli bona estonteco. € 6,00

Rimaro. Bill Thorne. Toruń: Flamo, 2003. 38p. 21cm. Kolekto de rimiĝantaj E-vortoj kun ekvivalentoj en la angla lingvo. € 3,60

Tinĉjo en Tibeto. Hergé. El la franca trad. H. Gonin. Paris: Casterman, 2005. 62p. ISBN 2203009276. 31cm. Bind. Tinĉjo kaj lia hundo Milu' vojaĝas al Tibeto por sperti novajn aventurojn. € 11,70

Über die Startbedingungen zweier Plansprachen. Schleyers Volapük (1879/80) und Zamenhofs Esperanto (1887). Reinhard Hauptenthal. Schliengen: Iltis, 2005. 47p. ISBN 3932807480. 21cm. Germanlingva. Kompara studo pri la aperkondiĉoj de Volapuko kaj Esperanto. € 6,60

DISKOJ

Gotas de esperanto. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Tri DVD-oj enhavantaj 60 lecionojn kaj amaseton da artaj suplementoj; suma daŭro: 6 horoj. € 60,00

Kompreni kanguruon / Kvin koloroj de Koreio. Roman Dobrzyński. Varsovio: La aŭtoro, 1997 / 1994. 62 + 30 min. Filmo pri Aŭstralio farita okaze de la 82-a UK + filmo pri Korea Respubliko farita okaze de la 79-a UK. DVD. € 18,00



En la rubriko **Laste aperis** menciigas nur tiuj varoj kiuj estas aĉeteblaj de la Libroservo de UEA, kaj kiuj ne menciigis antaŭe en tiu ĉi rubriko. Ni petas la eldonantojn de esperantaĵoj sendi al la Libroservo specimenojn de siaj eldonaĵoj kaj informojn pri prezoj, rabatoj, sendokostoj.



◉ **ALBANIO:** La 7-an de majo 2005 okazis la ekzamensio pri Elementa Nivelo de Esperanto ĉe la Tutnacia Hotela kaj Turisma lernejo de Tirana. Partoprenis la ekzamenon 15 gekursanoj kaj dek el ili akiris la diplomon. **Bardhly Selimi**

◉ **ITALIO:** De la 8-a ĝis la 10-a de aprilo okazis en Florenco ekspozicio pri ekologiaj temoj, TERRAFUTURA (estonta mondo), en kiu Itala Esperanto-Federacio partoprenis per propra budo, en kiu deĵoris ĉefe esperantistoj el Florenco kaj la ĉirkaŭa regiono. Centoj da vizitantoj estis informitaj pri Esperanto kaj ricevis ĝis elĉerpiĝo plurajn informilojn. La okazo estis utiligata por testi la reagon de la publiko al la nova inform-materio de Itala Esperanto-Federacio. Multaj vizitantoj surloke esprimis intereson lerni Esperanton kaj rete kaj per tradicia kurso. La grupo de Florenco aranĝas ĝin en la kadro de la pretig-laboro por la UK okazanta en Florenco.

◉ **HISPANIO:** En la tagoj 20-22 maj 2005 oni en Barcelono organizis la 6-ajn Feriojn de la Kulturaj Asocioj. Partoprenis ĝin 130 asocioj, inter ili Barcelona Esperanto-Centro. La urbestro de Barcelono Joan Clos vizitis la standon, rigardis librojn kaj interparolis kun BEC-estraranoj. La feriojn vizitis pli ol 10 mil personoj. **S. Aragaj**



◉ **BRAZILIO:** 107 homoj el 14 urboj de la sudparaiba valo okazigis en Paraiba-do-Sul, Brazilo, sian 60-an Renkontiĝon. Funkciis libroservo, okazis provlecionoj de Esperanto (J.R. da Silva kaj J. Salles) kaj la ĉina (Su Xue Yun), aktivaĵoj pri muziknotoj (V. Jordan) kaj abakkalkulo (Francisco Batista), prelego (palindromoj de P.S. Viana), intervjuo kun konataj movadanoj (Givanildo R. Costa kaj A. Sartorato), kvizo (Celso Tinta), kunvenoj pri la E-katolika movado (Jorge Linck) kaj E-klubo (Luiz A. de O. Coelho), konversacia rondo (Ademar S. Diniz), kvizo (Celso J. Tinta) kaj kantado de Vera Jordan.

Luiz Alberto de Oliveira Coelho

◉ **LITOVIO:** Ekde la 25-a de aprilo 2005 la oficejo de Litova Esperanto-Asocio en Vilno funkcias en sia nova ejo, sur la strato "av. de Gediminas 10/1", sur la tria etaĝo. Dume LEA okupas kvin ĉambrojn, kiuj estas jam riparitaj. Tie laboras la respondeca sekretario de LEA Irena Alijosiute, troviĝas ejo por biblioteko, salono por kunvenoj, kursoj, Esperanto-kluboj, libroservo de la asocio. Nova telefonnumero de la oficejo estas: 2312313, el alia litova urbo: 8 5 2312313, el alia lando +370 5 2312313. Bonvolu viziti la novan oficejon. **Povilas Jęgorovas**

◉ **LEARNU.NET:** Pli ol 30 000 vizitojn monate ricevas la retejo *Learnu.net*, kie eblas studi Esperanton en 24 lingvoj. Pluraj dekoj da kunlaborantoj vivigas la projekton, kiun finansas la organizaĵo Esperantic Studies Foundation. Tra la popularaĝa ret-serĉilo Google nun aperas reklamo pri *Learnu.net*. Fine de marto la teamo de la retejo sukcesis gajni konkurson de Google pri senpaga reklamo. De tiam aktivuloj preparadis la reklam-ŝildojn, kiuj ekde junio aperas diversloke en la reto.

◉ **VIKIPEDIO:** la Esperanta Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org>) atingis sian 25 000-an artikolon, pri la "Inkaa imperio". La Esperanta enciklopedio kreskas je proksimume 33 artikoloj tage, kaj dum la lasta jaro en ĝi aperis 7 500 novaj artikoloj. La Vikipedio-Projekto estas multlingva enciklopedio kun proksimume du milionoj da artikoloj en 92 lingvoj. La Esperanta versio rangas kiel la 14-a plej ampleksa Vikipedio laŭ la nombro de artikoloj. **Scott Starkey**

◉ **HUMANISTOJ:** La 1-an kaj 2-an de majo okazis en Peterburgo la 9-a konferenco de la Internacia Koalicio "Por la

Humanismo!" Enkadre de la programo Oksana Burkina elpasis kun la prelego *Humanismaj tendencoj en la moderna socio. Lingvistika aspekto*. La plej grava rezulto de la prelego estis unu el la oficialaj decidoj de la konferenco: Akcepti Esperanton kiel la lingvon por internacia komunikado de la Koalicio kaj establi kontaktojn kun humanistoj-esperantistoj. Oksana Burkina estas peterburga E-aktivulino, studanta nun en post-diploma fako de la Peterburga ŝtata universitato kaj verkanta disertaĵon pri moderna fonologio de Esperanto. Ŝi estas REJM-komitatano kaj membro de TEJO. Informoj pri la konferenco kaj ties decidoj troveblas ĉe: http://forhumanism.org/?target=ru/conf2005_about.html.

◉ **HASZPRA:** Prof. d-ro Ottó Haszpra, redaktoro de la iamaj *Sciencaj Komunikadoj*, estas membro ne nur de la Akademio de Esperanto, sed ankaŭ de la Hungara Akademio de Sciencoj. Li estis elektita ties korespondanta membro en 1998, kaj pasintjare kiel ordinara membro. La 14-an de aprilo 2005 li faris en la Salono de la Akademio sian membrisigan prelegon, kies titolo estis: *Samrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado*, kiun sekvis granda aplaŭdo de la 60-persona aŭskultantaro. La prelego estis la unua en la historio de la Scienca Akademio, kiam la membrisiga prelego plene temis pri Esperanto kaj temoj ligitaj al la Internacia Lingvo.

◉ **ZVEREVA/AMIS:** La 7-an de majo 2005, en la urbo Atlanto (Georgio, Usono) geedziĝis la redaktoro de *Kontakto* (kaj vicredaktoro de *Tejo Tutmonde*) Jenja Zvereva, kaj la redaktoro de *Tejo Tutmonde* (kaj vicredaktoro de *Kontakto*) Joel Amis. La ceremonio okazis en la Atlanta Loĝio de la Rozkruca Ordeno, AMORC (www.amorc.org), en la ĉeesto de parencoj, esperantistaj amikoj, kaj aliaj rozkruccanoj. Elkorajn bondezirojn!



DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: J. Salles; L. C. Franco; M. D. Gama. **Kanado:** J. Ostrowski.

PATRONOJ DE TEJO

Francio: A. Pialla; C. Longue-Epée; D. S. Clopeau; D. Loisel; E. Mas; F. Dherisnerie; C. Haren; J. Huberdeau; J. Filleul; C. Mahé; T. Nowak; P. Lelièvre; O. Masseron; P. Naulet; F. Bartsch; R. Triolle; L. Vignaud.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: C. Bracke. **Brazilo:** A. Rabêlo; M. Borges dos Santos; H. Schenk. **Bulgario:** D. Georgieva. **Ĉinio:** Yu Tao; Zhao Jianping; Tan Xiuzhu; Wang Yuqin; Wang Jing Rong. **Francio:** J. Bartsch; A. Loisel; C. Longue-Epée; D. Loisel; A. Huberdeau; H. Lafargue; J. Croze; J. Roy; M. Canonne; T. Nowak; J. Ducrocq; F. Bartsch; S. Amariglio; S. Lafargue. **Germanio:** H. Schindler; G. Macioszek. **Japanio:** A. Morita. **Kanado:** S. T. Norvell; M. Meijer-Brandma; T. R. Crisp. **Kazahio:** M. Baradosova; L. Aleksenko; M. Aleksejenko. **Koreio:** Lee Chong-Yeong. **Kroatio:** I. Osibov. **Nederlando:** R. Bossong. **Svedio:** G. Olsson; U. Luin. **Vjetnamio:** Pham Mai Lan.

DONACIOJ

Ĝis la 1-a de junio 2005

Kapitalo Afriko: **Nederlando:** A. Nonima 3000,00. **Svedio:** Norrköpings E-klubb 191,72. **Sumo ĉi-jara:** 6291,72.

Konto Afriko: **Germanio:** M. Westermayer 20,00. **Japanio:** T. Ono, Y. Takeuti - po 14,38.

Nederlando: C. & R. Bossong, F. J. Pieterston-Kruger - po 50,00; T. van Huis-Staritsky 40,00. **Svedio:** U. Luin 100,00; J. Hammarberg 140,01; T. Johansson (+) 79,88. **Usono:** M. Kennedy 26,00. **Sumo ĉi-jara:** 1535,40.

Fondaĵo Ameriko: **Nederlando:** T. van Huis-Staritsky 40,00. **Svedio:** J. Hammarberg 21,54. **Usono:** T. H. Goodman 15,42. **Sumo ĉi-jara:** 126,96.

Fondaĵo Azio: **Japanio:** Y. Sasaki, Esperanto-Densyusyo Sue, A. Hosida, Y. Yasumura, T. Nakamiti - po 14,39; H. Ie, M. Isaki - po 28,78; M. Isaki, I. Miyamoto - po 14,78; M. Aihara 14,80. **Sumo ĉi-jara:** 801,87.

Konto Arabio: **Germanio:** M. Westermayer 20,00. **Sumo ĉi-jara:** 177,00.

Konto Eŭropo: **Nederlando:** F. J. Pieterston-Kruger 50,00. **Sumo ĉi-jara:** 130,00.

Fondaĵo Canuto: **Francio:** T. A. Bonvarlet, M. Savre, J. C. Trebouet - po 20,00; A. Crisan 6,00; A. Fabre, R. Fabre, C. Maes - po 10,00; A. Peyron 16,00; J. J. Aumenier, L. M. Berthelin-Blumstein, S. Lafargue, B. Robineau - po 50,00; G. G. Chaumereuil 125,00; C. Longue-Epée 54,00; F. Ditacroute, M. Faugeras, C. Haren, M. Savignat- Belhote - po 30,00; F. Dherisnerie 40,00; F. Vurpillot 3,00; T. Nowak 100,00; P. Segur 60,00; P. Berizzi 5,00; J. Ducrocq 55,00; S. Amariglio 35,00. **Nederlando:** A. E. Moerbeek-Prins 150,00; A. & H. Bakker 1000,00; T. van Huis-Staritsky 30,00; F. J. Pieterston-Kruger 50,00. **Sumo ĉi-jara:** 2535,57.

Fondaĵo Espero: **Italio:** Itala E-Federacio (lingvo por paco) 947,00. **Kanado:** H. Schneebeli 12,41. **Nederlando:** T. van Huis-Staritsky 40,00; A. & H. Bakker 667,00. **Svedio:** Esperanto-klubo Lund 210,00. **Sumo ĉi-jara:** 3241,41.

Fondaĵo Junularo: **Argentino:** G. Giunti, A. Borenszweig - po 5,00. **Francio:** francaj e-istoj 40,00. **Germanio:** M. Westermayer 20,00; H. Bludszweit 10,00. **Litovio:** G. Porutis 5,00. **Nederlando:** (por IJK) A. & H. Bakker 1000,00; A. P. M. Witkam 50,00. **Serbio kaj Montenegro:** V. Mandarić 5,00. **Slovakio:** (por IJK) M. Minich 10,00. **Sumo ĉi-jara:** 1352,62.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: **Francio:** A. Fabre, H. Mougín - po 10,00; M. Basso 5,00; J. J. Aumenier, L. M. Berthelin-Blumstein, S. Lafargue - po 50,00; R. Fabre, J. C. Trebouet - po 20,00; F. Ditacroute, C. Haren, M. T. Lloancy - po 30,00; J. Croze 40,00; T. Nowak 100,00; J. Ducrocq 55,00. **Sumo ĉi-jara:** 500,00.

Volontula Fondaĵo: **Germanio:** M. Westermayer 20,00. **Sumo ĉi-jara:** 20,00.

Konto Afranko Tria Mondo: **Svedio:** L. Nordenstorm 215,41. **Sumo ĉi-jara:** 215,41.

Ĝenerala kaso: **Usono:** T. H. Goodman 15,42; P. N. Wigh 7,93. **Sumo ĉi-jara:** 503,02.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Naŭ prelegoj en IKU kaj tri AIS-kursoj en Vilno

Naŭ fakuloj prelegos en la 58-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato en la 90-a Universala Kongreso en Vilno. La Estraro aprobis la programon de IKU surbaze de la rekomendoj de la Komisiono pri IKU.

Du el la prelegoj funkcios ankaŭ kiel enkondukoj al samtema kurso de Akademio Internacia de Sciencoj. Ekster la formala kadro de IKU okazos krome tria AIS-kurso.

La Vilnan IKU-sesion inaŭguros ĝia rektoro, prof. Aloyzas Gudavičius (Litovio). Post la inaŭguro li prelegos pri etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto. Ankaŭ aliaj prelegoj rilatos al Esperanto aŭ interlingvistiko. D-ro Vilmos Benczik (Hungario) pritraktos skriban kaj voĉan Esperanton en semiotika spegulo kaj d-ro Aleksandr Duličenko (Estonio) la serĉadon de komuna lingvo por Eŭropo. Pri la aĝo de lingvoj parolos prof. Jouko Lindstedt (Finnlando), demandante, ĉu la litova vere estas

maljuna kaj Esperanto juna lingvo. Pri granda publiko povas sendube jam anticipi kalkuli ing. Toon Witkam (Nederlando) kaj d-rino Jane Edwards (Usono), kies temoj estos respektive aŭtomata tradukado kaj vampiroj. D-ro Shigeaki Nagamachi (Japanio) prelegos pri la evoluo de matematiko kaj moderna matematika fiziko.

La prelego de prof. Hans Michael Maitzen (Aŭstrio) kaj prof. Amri Wandel (Israelo), *La Lakta Vojo - nia hejmo en la universo*, kaj tiu de prof. leva Švarcaite (Litovio), *Homara agado en la teritorio de la lasta kontinenta glaciepoko en la ĉebalta regiono: ekologia aspekto* enkondukos AIS-kurson. Trian kurson de AIS en Vilno donos prof. Helmar Frank (Germanio) pri la temo *La Sibiua programo de eŭro-lingvistiko*.

Same kiel en Ĉiuj Universalaj Kongresoj ekde 1997, ankaŭ en Vilno kongresanoj povos aĉeti presitan kolekton de la IKU-prelegoj, kiu estos vendata post la UK en la Libroservo de UEA. *



Aktivula trejnado en Havano

Kun aktiva partopreno de pli ol 30 geesperantistoj el Havano kaj reprezento de la gestudentoj de Universitato de Informadikaj Sciencoj, okazis semajnfine (2005.05.21-22) Seminario pri Aktivula Trejnado en Havano.



Julián Hernández Angulo, prezidanto de KEA, bonvenigis la partoprenantojn kaj informis pri la *Aktuala situacio de la E-movado en Kubo*. Aliaj traktitaj temoj estis: Alberto Fernández-Calienes *Barrios Organizaj demandoj*; Albania Duthill Álvarez kaj Julián Hernández Angulo *Kulturo*; Marta Alonso Gutiérrez kaj Pedro Fernández Rodríguez *Instruado*. Posttagmeze okazis prelegoj de Maritza Gutiérrez González: *Utiligo de Esperanto laŭ la ekzemplo de Wikipedia*; *Esperanto, plia lingvo ĉe Nacia Inform-Agentejo (AIN)*; Ronald Baby González prezentis filmon dublitajn kaj subtitolitan en Esperanto. Juan Ramón Rodríguez Gómez prelegis pri *Informado pri Esperanto* kaj prezentis kantojn kun gitara akompano. Oni deklamis poemojn kaj karaokeo en Esperanto provis kantigi ĉiujn. Dimanĉe okazis Ronda Tablo kun la temo *Kiel plifortigi la movadon en Havano?* Ĝin gvidis Julián Hernández Angulo kaj Mario Ruiz Karell. Dum adiaŭa tagmanĝo oni aŭdis pozitivajn komentojn pri la fruktodona semajnfino, kiu certe efikos je pli bona E-laboro en la ĉefurbo.

Alberto Fernández-Calienes

Kunveno de la Turo de Princo

De la 2-a ĝis la 4-a de majo 2005 okazis Esperanta Kunveno de la Turo de Princo Teng en Nanchang, ĉefurbo de Jianĝi-provinco en suda Ĉinio.

La kunveno, kiun partoprenis 72 ĉinaj kaj 5 eksterlandaj esperantistoj (unu nigeriano, du poloj kaj du aŭstralianoj), havis riĉan programon kun interesaj interkona kaj distra vesperoj kaj ok kunsidoj pri *Disvolviĝo de Esperanto kaj komerco per Esperanto*, *Ĉina Esperanto-movado*, *Esperanto kaj interreto*, *Pri Antaŭparolo en la Turo*

de *Princo Teng* k.a. La partoprenantoj ĝuis busan ekskurson tra la urbo, admiris la antikvan Turon de Princo Teng, la Aŭtun-akvan kaj Bayi-Placojn. Dum la kunveno funkciis Libroservo, okazis ekspozicioj kun fotoj pri la Esperanto-Movado kaj Esperantaj filatelaĵoj.

Chen Ji



foto: la aŭtoro

Ni sciigu aliajn pri ni!

Ekde la 4-a ĝis la 11-a junio 2005 okazis en la urbo Partizánske (Slovakio) la trejn-seminario „Ni sciigu aliajn pri ni“. Junaj aktivuloj lernis kiel krei diversajn informilojn ilin uzi kaj efike kaj praktike.

Partoprenis 18 homoj el 7 landoj. La trejn-seminaron organizis SKEJ – Slovakia Esperanta Junularo kaj grupo Esperanto ĉe Interreto, kaj subtenis ĝin la EU-fondusa programo Junularo.

La unua el la du ĉefaj programlinioj traktis kreadon de paperaj informiloj (afiŝoj, flugfolioj, ktp). La trejnisto Haris Subačić baznivele sciigis la ĉeestantojn pri la ebloj de aspektig-programoj (Corel Draw, Adobe Photoshop), kaj donis ĝeneralajn konsilojn.

Poste la partoprenantoj havis spacon por krei proprajn afiŝojn. Fine de la seminario ne nur la trejnistoj pritraktis

la afiŝojn, sed okazis ankaŭ konkurso. Laŭ la partoprenantoj en la por-Esperanta kategorio la plej bonaj verkoj estis de Vilam Búr, Lukasz Zebrowski, Katharina Tanzberger kaj Veronika Szabó, kaj en la kontraŭksenofobia kategorio verko de Tomasz Rozmiarek.

La dua programlinio temis pri kreado de multmediaj KD-oj/DVD-oj. Vilam Búr parolis pri la grandeco kaj universaleco de diversaj dosier-formatoj, gvidis kurson pri *Kiel krei retpaĝojn kaj kiel uzi ilin por kunigi multmedian enhavon de KD aŭ DVD*. Kiel ekzemplon la ĉeestantoj

fotoj: Vladimír Meštnér



"Pacaj batalantoj" de la slovakia trejn-seminario dum ekskurso al Bojnice-kastelo

ricevis KD-n kun afiŝoj kaj fotografaĵoj, kiujn ili mem faris dum la seminario.

Sian spacon trovis ankaŭ la prelego *La interkultura kaj psikologia aspekto de informoj* fare de Peter Baláž, kelkfoje estis pritraktata la temo *Projektoj*, loka konzultanto informis (slovaklingve, kun traduko) pri la fondusa programo Junularo, Stano Marček prelegis pri enpaĝigo de revuoj kaj artikol-verkado, kaj Petr Chrdle pri Internacia kopirajto. La ĉeestantoj vizitis lokan reklam-agentojn REKUK kaj spertigis pri kreado de reklamaĵoj.

La organizantoj dekomence sukcesis krei amikan, agrablan kaj kreman etoson. Dank' al tio la prelegoj estis ne nur monologoj de la prelegantoj, sed ankaŭ okazo por inspir- kaj spertig-plenaj diskutoj. La trejnseminario estas ankaŭ pruvo, ke se ni uzos Esperanton ne kiel celon, sed kiel ilon, nia agado povas esti subtenata de ne-Esperantaj internaciaj organizaĵoj. Niaj celoj ja ne kontraŭas, sufiĉas nur trovi la plej taŭgan metodon. Eble tio estas la ĝusta vojo al la fina venko.

Rastislav Šarišský

Freŝa vento en Mataró

Dum oktobro 2004 la liberecana sindikato CNT en la urbo Mataró petis de Kataluna Esperanto-Asocio kurson de Esperanto. La 23-an de oktobro oni publike prezentis ĝin kaj en novembro la kurso komenciĝis kun surpriza partopreno de 26 lernantoj.

La kurso, kiu disvolviĝis en du niveloj kaj al kiu KEA sendis du instruistojn, daŭris ĝis majo 2005. Mataró ne estas nova loko por la esperantistaro: plurfoje Kataluna Esperanto-Junularo organizis renkontiĝojn en la urbo kaj en 1995 tie okazis la nacia kongreso. La loka bulteno *Subversats* uzas Esperanton de pluraj jaroj. KEA arangas ĉiujare kvar renkontiĝojn. La unua okazis ĉi-jare en Mataró kaj ĝi fariĝis 70-homa kongreseto kun kvar samtempaj programoj.

foto: la aŭtoro



Rezulte de la Esperanto-kurso en Mataró tie aperis nova Esperanto-grupo kaj venontjare sekvos trisemajna intensa Esperanto-kurso. Unu el la iniciatoj de la grupo estis dissendo de cirkuleroj al la tuta sindikata sidejaro de Katalunio kaj Balearoj, konsilantaj la lernadon de Esperanto, kune kun cirkulero de KEA, kiu proponis siajn lingvoservojn. El tio jam sekvis, ke aperos prezento pri Esperanto en la ĉi-jara jarlibro de la katalunaj liberecanoj.

Ferriol Macip i Bonet

John A. Cole (1922-2005), dumviva membro, iama delegito kaj fakdelegito pri urbaj aferoj mortis en Santa Barbara, Usono.

Paulo Izaías Ereno (1949-2005), aktivulo de la E-movado i.a. en la brazila ŝtato Rio Grande do Sul, forpasis la 1-an de junio. En 1973-74 li laboris kiel grafikisto en la Centra Oficejo de UEA.

D-ro György Ferencz (1908-2005) forpasis la 30-an de januaro en Budapeŝto. Eminentaj juristo, esperantisto ekde 1926. Li aktivis precipe movade unue en sia jun-aĝo, i.a. membro de UEA ekde 1928 kaj delegito 1932-34. En 1964 li reaktivigis kaj en 1970 realiĝis al UEA. Li precipe aktivis kiel instruisto kaj i.a. anstataŭis prof. Szerdahelyi en la E-fako de la universitato ELTE en 1977-78. Honora membro de Hungara E-Asocio ekde 1991. Aperigis multajn artikolojn, precipe pri juraj temoj, en "Hungara Vivo" k.a. gazetoj.

ITO Kanzi (1918-2005), "Ludovikito", honora membro de UEA, forpasis post longa malsano la 25-an de aprilo en Kioto. Li esperantistiĝis en 1959, kiam oni festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof. Tio kvazaŭ aŭguris, ke kolektado kaj publikigo de la verkoj de d-ro



Zamenhof estis fariĝanta lia vivoverko, al kiu li sin dediĉis dum pli ol tri jardekoj. Kiam UEA petis lin verki biografieton pri si por tiu ĉi revuo, krom la jaroj de siaj naskiĝo kaj esperantistiĝo, li skribis nur: *komencis eldonadi la pvz-on en 1973*. La minuskle skribita PVZ – li konsekvence ne uzis majusklojn – estas mallongigo de *Plena Verkaro de Zamenhof*, al kiu li aldonadis la vortojn *iam kompletigota*, ĝis li fine povis anstataŭigi ilin per *iel tiel kompletigita*. La grafike bela kompleto konsistas el 16 volumoj de originalaĵoj, 7 de tradukoj kaj 8 miksenhavaĵoj kromkajeroj. La plej signifajn verkojn li kunigis en la trivoluma *iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof (Originalaroj I-III)*. Tria serio estas Ludovikologia Dokumentaro, *eble neniam kompletigotaj necesaj aldonoj al la pvz*, kies plano antaŭvidis 26 volumojn, el kiuj aperis 21. Ito Kanzi krome verkis

pli ol 5000-paĝan japanlingvan biografian romanon pri la vivo de Zamenhof, kies unua volumo aperis en 1967 kaj la lasta en 1978.

D-ro Klaus Karner (1943-2005) mortis neatendite la 27-an de majo. Li estis reprezentanto de SAT en Aŭstrio kaj dum la lastaj jaroj instruis Esperanton en la Universitato de Innsbruck.

Prof. d-ro Jan Knappert (1927-2005), internacie fama fakulo pri la svahila lingvo, mortis la 30-an de majo 2005 en Hilversum, Nederlando. Li profesoris en Loveno kaj Londono kaj pluraj universitatoj afrikaj. Li prelegis en pluraj TEJO-seminarioj en la 70-aj jaroj kaj estis rektoro de IKU de la 73-a UK en Roterdamo en 1988. Lia dudirekta *Esperanto-suahila vortaro* aperis en du eldonoj (1983, 1996).

Lalju C. Lalev (1922-2005), iama delegito, mortis la 8-an de februaro en Trojan, Bulgario.

MAEDA Kimiko (1928-2005) mortis la 21-an de januaro. Nomata de Ludovikito kiel *unusola mia amikino*, ŝi estis lia sekretario en medicina eldonejo. Ŝi eklernis Esperanton kun s-ro Ito kaj estis poste, sub la pseŭdonimo "emilia k. m. ĝojkampf", unu el la

"provizoraj komitatanoj" de PVZ.

Josef Merz (1938-2004), dumviva membro, mortis en Bamberg, Germanio.

Ali B. Milani (1913-2005), iama fakdelegito pri bahaismo, forpasis la 25-an de marto en Sidnejo. Li naskiĝis en Turkmenio kaj aktivis por Esperanto, precipe en bahaaj rondoj, en Britio, Usono kaj Aŭstralio. Li gvidis korespondan E-kurson kaj partoprenis en multaj UK-oj.

Ivan Slávik (1932-2005), mortis la 22-an de majo en Nová Dubnica, Slovakio. Li estis fakdelegito pri ĵurnalismo kaj aktiva aŭtoro de krucvortenigmaj por *Esperantisto Slovaka*.

Kjell Walraamoen (1931-2005), kunverkinto (kun Lina Gabrielli) de la poemaro "Ni devas vivi" (1974), mortis en Alvdal, Norvegio, la 20-an de majo.

L.A. Walther (1917-2004) mortis en Portland, Usono. Ŝi estis regula membro de Societo Zamenhof kaj patrono de TEJO.

Julie Winter (1906-2004) forpasis en Wolfhagen, Germanio. Ŝi estis konstanta membro de Societo Zamenhof ekde 1979. De 1969 ĝis 1992 ŝi estis respondeculo de Veterana Esperantista Klubo.



RETORIKO

Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Bindita kun kromkovrilo. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



2 paroladoj de Ivo Lapenna I. Fondaĵo Ivo Lapenna, 2003. 66 min. La unua en serio de kvin kompaktaj diskoj enhavantaj paroladojn de I. Lapenna. "Esperanto kiel lingva esprimo kaj instrumento de humaneca internaciismo" (Graz, 1987); "Lingva diskriminacio" (Nürnberg, 1964). Prezo: €18,00.



2 paroladoj de Ivo Lapenna II. Fondaĵo Ivo Lapenna, 2003. 58 min. La dua KD en la serio. "100 jaroj de parola Esperanto-kulturo" (Graz, 1987); "Parolado dum la solena inaŭguro de la monumento 'La Espero' en Graz, 1987". Prezo: €18,00. Sesona rabato ekde 3 ekz. de la sama disko.



ESEJOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: €45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



Hamburgo en retrospektivo. Ivo Lapenna. Kopenhago: Horizonte, 1977 (tria kompletigita eld.). 11+151p. 21cm. Interpreto de la aŭtoro pri sia forlaso de UEA en 1974. Prezo: €16,50. Sesona rabato ekde 3 ekz.



Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo. Ivo Lapenna. Roterdamo, 1952. 144p. 20cm. Fundamentaj nocioj – Lukto por la paco per juraj rimedoj – Internaciaj organizaĵoj. Prezo: €8,40. Sesona rabato ekde 3 ekz.

Jarlibro 2005 aperis

Kun moderna kovrila dezajno fare de Ferriol Macip i Bonet aperis Jarlibro 2005 de UEA.

Maĝe al la jubileo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto la 288-paĝan volumon malfermas foto de Alfred Michaux kaj Paul Boulet, organizintoj de la Bulonja Kongreso en 1905. La antaŭparolon de Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA, inspiris ankaŭ tri aliaj jubileoj: same antaŭ cent jaroj fondiĝis la Lingva Komitato, estis eldonita la *Fundamento de Esperanto* kaj ekaperis la revuo *Esperanto*.

En la unua parto de la *Jarlibro*, eldonita ankaŭ aparte kiel *Gvidlibro 2005*, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, same kiel pri landaj kaj fakaj asocioj, pri edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj k.a. establoj. Krom tio oni trovas tie la Esperanto-rezoluojn de Unesko kaj la gvidliniojn de UEA por informado pri Esperanto. La Jarlibro enhavas multajn anoncojn kaj kuponon, kiu rajtigas je 10-procenta rabato ĉe la libroservo de UEA. Du trionoj el la libro konsistas el la adresaro de la Delegita Reto de UEA kun 1784 individuoj en 92 landoj. Estas 53 ĉefdelegitoj, 991 lokaj delegitoj, 133 vicdelegitoj, 36 junularaj kaj 1344 fakaj delegitoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakaj delegitoj reprezentas ĉ. 800 fakojn. Du el tri delegitoj estas kontakteblaj retpoŝte, ĉar sian retadreson publikigas 1203 delegitoj, t.e. 67,4% el la tuta delegitaro. Sub la koncernaj urboj aperas kontakt-informoj pri 81 lokaj Esperanto-grupoj en 28 landoj.

Invito al Esperanta Fabelkonkurso

La finna literatura centro Päätaalo-instituto okazigas jam la sesan fabelkonkurson en Esperanto por infanoj. Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 8-jaraj, 9-10-jaraj kaj 11-13-jaraj.

La konkursaĵoj estu verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). En la skribado aŭ tajpado plenreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

Oni sendu la konkursaĵojn poŝte kaj ili alvenu plej laste la 15-an de septembro 2005 je la adreso: Päätaalo-instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI- 93401 Taivalkoski, Finnlando.

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto. La rezultojn oni publikigos la 18-an de oktobro, kiam finnoj festas la nomtagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu branĉo estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉefpremon "Fabelo Internacia".

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso: S-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; rete: aini.esp@pp.inet.fi.

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, legeblas en: <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>

Speciala oferto

Lige kun la centjariĝo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj okaze de la 90-a UK, UEA eldonis historian libron pri traktantan la plej grandan kaj gravan regulan eventon en la Esperanta movado. *Sed homoj kun homoj*. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005, kompilita de Ziko Marcus Sikosek, estas abunde

Ziko Marcus Sikosek

Sed homoj kun homoj


Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005

ilustrita kaj informriĉa verko, havinda por ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de Universalaj Kongresoj. Bindita: €30,00; broŝurita: €21,00. En 2004 UEA eldonis kompaktdiskon traktantan la saman temon kaj same kompilitan de Ziko Sikosek. *Universalaj Kongresoj* enhavas dek pecojn registritajn en UK-oj kaj daŭras 73 minutojn. €9,90.

Se vi mendas samtempe kaj la libron kaj la diskon, vi ricevas 10%-an rabaton. Por ĝui la specialan rabaton sendu vian mendon al la Libroservo de UEA antaŭ la 31-a de aŭgusto 2005. Ĉi tiu oferto ne kombineblas kun aliaj ofertoj kaj rabatoj.

ANKORAŬ PLIAJ GASTIGANTOJ

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974. Ĉi-jare ĝi enhavas 1364 adresojn en 89 landoj, sur 226 paĝoj.



La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas mendi ĝin kontraŭ 15 EUR + sendokostoj (kun triona rabato ekde tri ekz.) ĉe la Libroservo de UEA.

Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA, de la kompilinto aŭ de la landaj organizantoj.

Pliaj informoj ĉe la kompilinto: Derk Ederveen, Westenburgstr. 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando, paspaserv@wx.nl, aŭ ĉe: www.esperanto.net/ps.

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO




Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-komunumo? Kiel lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Kontribuoj de Humphrey Tonkin, Werner Bormann, YAMASAKI Seikō, Amri Wandel, Renato Corsetti kaj Detlev Blanke.

Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71p. Prezo: €7,10. Triona rabato ekde tri ekz.

ĈU VI VOLAS DEFENDI ESPERANTON TRAFE?

Lernu el tiu ĉi DISKUTLIBRO POR MALPLI UZATAJ LINGVOJ unue eldonita de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.



Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj de Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. Prezo: €7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.